AFGT-I KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN

HUNGARA VIVO

3
1984
13,-Ft

mini hi-fi torony

ST 1025 sztereo tuner

SE 1025 sztereo erősítő

SM 1025 sztereo kazettás deck



ORION TV RADIO

HUNGARA VIVO
Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII.Kenyérmező u.6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf.193. H-1368
Aperas dumonate
XXIVa jaro, 1984 n-ro 3
(115)

ENHAVO

Rados, P.A.: Budapeŝta Printempa Festivalo – la kvaran fojon 82
Bikfalvi, G.: Konanto kaj amanto de Oriento 84
Benczik, V.: Arĝenta jubileo de porinstruistaj altlernejoj 85
Petőfi, S.: Johano la Brava (Fragmento) (K. *Kalocsay*) 86
Benczik, V.: Pri la hungara ekonomia reformo 88
Honorigo de meritplenaj esperantistoj 90
Esperantista Pacrenkontiĝo en Pardubice 91
Nemere, I.: La subtegmentejo 93
Clelia Conterno Guglielminetti (1915–1983) 94
Kabos, E.: La vizitantinoj de Maria (Jozefo *Kiss*) 95
Du libroj por ĉiuj 97
Dek unu pioniroj de la pacmovado 98
„Pola Esperantisto" reviviĝis 98
Originala poezio (J.*Varga,* I.*Szabó,* A.*de' Giorgi,* Z.*Heide, Shi Chengtai,* E.*de Kock*) 99
Panoramo 100
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 103
Bálint, Sz.: La kukolido 104
Ĵus aperis! 105
Köves, F.: Disvolvo de ŝtaltuboproduktaĵoj por la naftoindustrio, kaj ties rezultoj (E. *Fenyvesi*) 106
La Libro de la Jaro 1983 114
Recenzoj de V.*Benczik,* I. *Szabó* 114
Fenyvesi, E.: Gaja paĝo 117
Paĝo de komencantoj 118
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 119
Leterkesto, Korespondi deziras 120

Sur la frontpaĝo foto de Z. *Fejér*

Somera varmo...

kompensas la loĝantojn de Eŭropo pro la iom tro rigora vintro, kiel tio videblas ankaŭ sur nia frontpaĝa bildo. Kaj tiu ĉi numero portas al la somerumantoj espereble vere legindajn kontribuaĵojn por la feria sezono.

Literaturamantoj nun ne havas kaŭzon por plendi. Ili povas legi eĉ du novelojn: la ŝveb-atmosferan „La vizitantinoj de Maria" de Ede *Kabos,* kiu ĉerpas sian temon el la Biblio, kaj „La subtegmentejo" de István *Nemere,* kiu estas kortorporige bela, kvazaŭ poezia omaĝo al la maljunaĝo. Al tiuj ĉi du aldoniĝas unu plia novelo, kies fino, kiel kutime, mankas. Profitu la someran libertempon por fini ĝin!

Sur la paĝoj 86-87 legeblas fragmento el „Johano la Brava", la rave ĉarma popolfabelo en versoj de Sándor *Petőfi,* kun la ĝojiga informo, ke la tuta verko reaperas – nun jam la kvaran fojon – en la majstra Esperanta traduko de Kálmán *Kalocsay.* En la rubriko „Originala poezio" denove legeblas bukedo da poemoj de Esperantaj poetoj. „Du libroj por ĉiuj" – sub tiu ĉi titolo aperas artikolo, kiu deziras turni la atenton de ĉiuj klerigemaj esperantistoj al „Gvidlibro por supera ekzameno" kaj „Baza Literatura Krestomatio". Oni ne forgesu, ke tiuj du libroj, precipe la lasta, estas ne nur lerniloj, sed ankaŭ agrabla kaj varia legaĵo.

En ampleksa artikolo ni raportas pri la ĉi-jara Budapeŝta Printempa Festivalo, el kies programo nun, bedaŭrinde, mankis „Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj", tamen, jam nun ni povas heroldi, ke en la venonta jaro denove la publiko povos vidi altnivelajn esperantlingvajn prezentadojn en Budapeŝto.

Antaŭ cent jaroj naskiĝis la fama hungara orientalisto Gyula Germanus: ni volonte omaĝas al tiu ĉi jubileo per artikolo, tiom pli, ke la fama scienculo plurfoje esprimis sian subtenon al Esperanto. Alia prijubilea artikolo tuŝas pedagogian temon – la instruadon en la hungaraj porinstruistaj altlernejoj.

Fine de marto kunvenis multaj esperantistoj en la Ĉeĥoslovakia urbo *Pardubice,* okaze de la „6-a Internacia Pacrenkontiĝo": tiaj kunvenoj en la nuntempa internacia politika klimato havas netakseble altan signifon. Ni raportas pri ĝi konsciante tion.

Iom nekutime longa faka artikolo aperas en tiu ĉi numero. Ni ne sekretigas, ke tio ne malŝatinde kontribuas al la financoj de la revuo, tamen, ni estas certaj, ke multaj el niaj legantoj profitos la artikolon por la evoluigo de siaj faklingvaj scioj.

Komencantaj esperantistoj denove povas legi ĉerpaĵon el la ŝatinda verko de Albert *Lienhardt:* „Amuza Legolibro en Esperanto".

Jen, tiom pri tiu ĉi numero. Post du monatoj denove Vi trovos ĝin en Via leterkesto.

Budapeŝta Printempa Festivalo – la kvaran fojon

Foje en Budapeŝto komence de printempo (en 1978) la Hungara Fremdultrafika Oficejo kun Entrepreno pri Fremdultrafika Eldonado kaj Propagando organizis ekspozicion pri turismo. Post tri jaroj al tiu aldoniĝis granda aranĝo, nome la Budapeŝta Printempa Festivalo (BPF).

140 lokoj – 1400 eroj

La ĉi-jara el tiu serio estis do la kvara, dum la ekspozicion (ĝia nomo estis: Vojaĝo '84) oni aranĝis la sepan fojon.

La festivaloj, iĝintaj jam tradiciaj, okazas en la fino de marto. Iom post iom ili ekhavis sian propran karakteron, nome iĝis precipe festoj de la hungara kulturo.

BPF de 1984 okazis inter la 16-a kaj la 25-a de Marto. Ĝiajn pli ol 1400 aranĝaĵojn la publiko povis ĝui en 140 diversaj lokoj.

Inter la muzikaj programeroj elstaris la ludado de ĉiuj Beethoven-simfonioj, kies orkestrestroj estis tiaj tutmonde konataj artistoj, kiel János Ferencsik, György Lehel, András Kóródi. Ankaŭ la famaj pianistoj Zoltán Kocsis kaj Ferenc Rados ludis dum la Festivalo. Preĝejaj koncertoj okazis jam ankaŭ dum la pasintaj BPF Ĉi-jare same granda estis la intereso pri



György Cziffra subskribas sian libron

En la renkonto de danckluboj

ili. Tiuj ĉi muzikaj eventoj okazis en la katolika Matias-preĝejo, en la Kalvinana (reformita) preĝejo ĉe la placo Ĉalvin, en la Luterana (evangelia) preĝejo ĉe la placo Deák, kaj en la granda sinagogo en la strato Dohány. Krome, muzikaj programoj abundis en la operejo „Erkel", en Muzikakademio, en Kongresa Halo de la Hungara Scienca Akademio, en hotelo „Atrium Hyatt", en la Sporthalo Budapest (Kongresejo de la pasintjara UK), en multaj aliaj lokoj.

Belegajn baled-spektaklojn dancis la baledensemblo de la Budapeŝta Operejo kaj tiu de urbo Győr.

El la abunda programo

La Budapeŝtaj teatroj ludis dum la Festivalo tiajn pecojn, kiuj povis esti interesaj kaj por la en- kaj por la eksterlanda publiko. Ekzemple: la Operetejo prezentis verkojn de Hervé, Kálmán, Jacobi kaj Lehár, la fama Budapeŝta teatro „Vígszínház" ĝuste dum la BPF okazigis premieron de Don Carlos de Schiller, la teatro „Madách" ludis la muzikan komedion de Webber-Eliot „Katoj". Krom tio en Budapeŝto gastis la Sveda Reĝa Dramteatro kun dramoj de Strindberg kaj Norén. En la hungara ĉefurbo gastludis ankaŭ la Viena Popolteatro kun „La Koncerto" de Hermann Bahr.

El la abunda programo oni povas ankoraŭ mencii la popolartan foiron en la Sporthalo Budapest, la renkonton de t.n. „Dancejoj" (kluboj pri lernado kaj praktikado de tradiciaj popoldancoj), literaturajn programojn kun muziko de la naciaj minoritatoj, vivantaj en Hungario, Internacian Renkontiĝon de Pantomimensembloj. Okazis ankaŭ ĵaz- kaj „country"-programoj, diskotekoj kaj aliaj leĝermuzikaj eroj.

La Hungara Nacia Galerio aranĝis ekspozicion el la verkoj de la genia june mortinta pentristo Béla Kondor,

Esperanta stando ĉe „Vojaĝo '84"

Pentroartisto Jenő Barcsay (Foto de Z. Fejér)



La ekspozicio de Béla Kondor (Foto de Z. Fejér)



Koncerto de liutista ensemblo

artaj kreaĵoj fare de Jenő Barcsay el la grafikserioj „Anatomio" kaj „Homo kaj Tolaĵo". En Halo de Artoj viziteblis Tutlanda Bildarta Ekspozicio.

Elstaraj gastoj de BPF

Partoprenis la Festivalon hungaraj artistoj, vivantaj eksterlande: la granda pianisto György Cziffra, kiu eĉ koncertis tiutempe en diversaj urboj de Hungario, Amerigo Tot (Imre Tóth), la elstara skulptisto, André (András) Kertész, la monde konata fotartisto (same kun ekspozicio). Ĉeestis ankaŭ Michel (Mihály) Gyarmathy el Parizo, la arta gvidanto de Folie-Bergère, kiu ĵus antaŭ BPF ricevis altan hungaran ŝtatan distingon, la Flag-Ordenon de la Hungara Popolrespubliko pro la popularigo de Hungario kaj ties kulturo.

Kvankam la Printempa Festivalo konvene al sia nomo estas „Budapeŝta", tamen ĉi-jare ĝiaj eroj okazis ankaŭ en aliaj hungaraj urboj, ekzemple en Győr, Pécs kaj Esztergom, sed precipe en Sopron, kiu nomiĝas la Okcidenta Pordego de Hungario.

La pligrandiĝintan intereson pri la Festivalo karakterizas ankaŭ tio, ke dum ĝi kunsidis en Budapeŝto la Komitato de Aliĝintaj Membroj de Tutmonda Organizo pri Turismo, konsultiĝo pri bildartoj „Art Forum '84" mondkongreso de porjunularaj turismaj oficejoj kaj tiu de gazetaraj fotistoj.

Esperanto dum BPF

Jam de 1981 estas tradicio, ke Hungara Esperanto-Asocio partoprenas la Budapeŝtan Printempan Festivalon surbaze de la Manila Deklaro pri Turismo, kiu laŭ hungara iniciato proponis Esperanton lingvo de la turismo. En 1981 nia Asocio havis malgrandan giĉeton en Etnografia Muzeo, kie tiutempe estis organizita la ekspozicio „Vojaĝo '81". En 1982 al tio aliĝis Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj, kiu estis aranĝita ankaŭ en 1983. En tiu ĉi jaro la lasta ero ne okazis, sed la Asocio partoprenis en la ekspozicio „Vojaĝo '84", kiu okazis en la pavilonoj de la Budapeŝta Foirejo. La aranĝon vidis multe da homoj el la tuta lando, des pli, ĉar ĉi-jare la Ŝtata Fervojo donis 50-procentan rabaton al la vizitantoj de la ekspozicio.

Ĉe la stando de la Asocio deĵorantoj informis la interesiĝantojn pri la Internacia Lingvo, pri la Esperanto-movado, ili vendis librojn, vortarojn kaj esperantaĵojn. La plej granda intereso estis pri la t.n. „mini-kursoj" de Esperanto, kie eblis „ellerni mil vortojn dum kvin minutoj", t.e. lerni kalkuli de unu ĝis mil Esperante. Tiuj kiuj volis scii pli multe, per la tabeloj sur la muroj de la stando, povis lerni la finaĵojn „O-A-E" kaj ilian rolon, la artikolon, la pluralon kaj la akuzativon. Krome: estis afiŝitaj la personaj pronomoj kaj la ses verbaj finaĵoj. Surbaze de tio la gastoj jam povis eldiri la plej belan frazon Esperante: „MI AMAS VIN."

Tiuj etaj kursoj elvokis intereson ankaŭ ĉe la eksterlandaj ekspozicianto j, kies standoj situis proksime al la nia. Franca junulino eĉ petis informojn kaj volonte lernis la bazon de la gramatiko.

La plej multaj interesiĝantoj estis tamen hungaroj. Pluraj el ili eĉ anoncis sin partopreni kurson de la Internacia Lingvo.

Espereble, venontjare okazos Budapeŝta Festivalo, kiun denove partoprenos Esperanto. Sed tiam tre verŝajne estos en la programo ankaŭ la Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj. Ni atendas ĉiun esperantiston por viziti ĝin. Do, jam nun komencu kolekti monon por vidi la tutan aranĝaĵon. Ne forgesu: la Esperanta teatra sezono daŭras nur dek tagojn (eĉ ne ĉijare), kaj ĝia pluvivo dependas de nia intereso.

Péter András *Rados*

Gastrolo de la Viena „Volkstheater"



Konanto kaj amanto de Oriento

La magia Oriento ĉiam allogis hungarojn. La vivo kaj la verkaro de multaj hungaraj sciencistoj kroĉiĝas al la esploroj de Oriento.

La unua fama hungara orientalisto Gyula *Germanus* naskiĝis la 6-an de novembro 1884 en Budapeŝto. Li studis en hungaraj, aŭstraj kaj germanaj universitatoj, kaj inter liaj profesoroj estis Ármin Vámbéry, Ignác Godzieher k.a. Germanus lernis la turkan kaj araban lingvojn, kaj liaj unuaj artikoloj aperis en „Keleti Szemle" („Orienta Revuo").

Kiel stipendiulo li faris longan studvojaĝon en Anglio, kie li laboris en la Orienta Sekcio de la Brita Muzeo. Tie ĉi li ekkonis Orienton en ĝia plena riĉeco, kiel spirita fonto de la monda kulturo. Li studis la rilatojn inter la brita kaj turka imperioj, kaj la movadojn de la orientaj popoloj. Li iĝis forta simpatianto de la movado de „Junaj turkoj".

Post sia reveno Germanus instruis en la Budapeŝta Orienta Komerca Akademio kiel profesoro de la turka kaj araba lingvoj, intertempe li faris plurajn balkanajn kaj turkiajn studvojaĝojn, kaj li publikigis multajn artikolojn en „Budapesti Szemle" („Budapeŝta Revuo"), per kiuj artikoloj li informis la legantojn pri la batalanta Islamo. Dum tiu ĉi tempo li aperigis multajn lingvistikajn kaj historiajn studojn kontraŭ la tiranismo kaj la rasteorioj.

Inter la du mondmilitoj Germanus laboris kun neelĉerpebla energio. En 1921 li fariĝis profesoro de la Orienta Instituto de Budapeŝta Universitato. Li instruis orientajn lingvojn kaj historion kaj li aktive partoprenis en la literatura vivo. Dume li okupiĝis pri la orienta mistikismo kaj la historiaj fontoj de Islamo.

En tiu ĉi periodo por li montriĝis oportuna ebleco viziti Hindion, kaj en 1929 li lekciis en la islama katedro de Santiketana Universitato. Rezulto de lia „hindia periodo" estis lia libro pri Mahatma Gandhi.

En la Kaira Universitato „El-Azhar" Germanus perfektigis sian araban lingvoscion. Poste li faris pilgrimvojaĝojn al Mekka kaj Medina, kie li konatiĝis kun la lulilo de la islama kulturo kaj tradicioj. Tiam li ofte artikolis en la internaciaj islamaj revuoj pri siaj vojaĝoj, kaj li verkis kelkajn interesajn librojn. Kiel resumon de sia longjara laboro li eldonis la libron „Allah Akbar", per kiu libro li riĉigis la mondan kulturon. En 1939 li vojaĝis en Egiption kaj Sudan Arabion.

Post la dua mondmilito por la fama sciencisto komenciĝis nova epoko. Li ĝisvivis la liberiĝon de la Oriento. En 1948, en la Budapeŝta Universitato li fondis la katedron pri araba lingvo kaj kulturhistorio, kiu katedro iĝis laboratorio de la hungara arabistiko. En siaj verkoj Germanus pristudis la modernan araban literaturon. Li aperigis plurajn pionirajn studojn pri la literaturo de Jemeno, Suda Arabio, Palestino, Maroko kaj pri la elmigrintaj araboj en Ameriko.

En siaj verkoj pri la historio de la araba literaturo Germanus montris la araban spiritan vivon, la rolon de la sektoj, kaj la specifojn de la malnovaj kaj novaj arabaj epokoj. Li prelegis pri la klasika kaj nuntempa araba literaturo, pri la mahometana kulturhistorio, pri la islama juro kaj pri la problemoj de Islamo.

Germanus prelegis en la universitatoj de Kairo, Aleksandrio kaj Damasko. Lia libro aperis en la Pakistana urbo Lahore, li estis membro de Itala *Academia del Mediterraneo,* kaj korespondmembro de la Scienca Akademio en Kairo, Bagdado kaj Damasko, kaj de la Londona *Institute for Cultural Research.* Liaj lernantoj, sub lia gvido, eldonis anglalingve la libron „The Muslim East" („La islama Oriento").

Gyula Germanus, la sciencisto, la granda amiko de araboj, hindoj, turkoj kaj mahometanoj mortis la 8-an de novembro 1979 en Budapeŝto, sed lia personeco kaj lia verkaro eterne restis kun ni. Géza *Bikfalvi*

Gyula Germanus (1884–1979)

Arĝenta jubileo de porinstruistaj altlernejoj

Ĝis 1959 la instruistoj de la unuaj kvar klasoj de la ĝeneralaj (elementaj) lernejoj ricevis nur mezgradan edukadon. Tio signifas, ke en la aĝo de 18 jaroj, post entute 12-jara lernado ili eniris la klasĉambron jam kiel instruistoj, alfrontante la grandegan taskon instrui al la plej etaj lernejanoj la bazajn konojn de la homa kulturo. Ilia laboro decide influis la postan karieron de la infanoj, ja ĝuste dum la unuaj kvar jaroj de la lerneja vivo oni kreas la fundamenton de la sekva pli profunda studado. Se tiu fundamento ne metiĝis sufiĉe solide, la dolorajn postsekvojn de tio oni povas senti eĉ ĝis la vivofino.

Montriĝis do necese doni superan edukadon al la instruistoj de la kvar unuaj klasoj de ĝeneralaj lernejoj. Tial en la jaro 1959 oni kreis la porinstruistajn institutojn, kiuj meze de la sepdekaj jaroj ricevis altlernejan rangon. En la porinstruistaj altlernejoj la edukado daŭras tri jarojn; dum tiu tempo la gestudentoj (fakte plejparte studentinoj) ricevas aparte profundajn konojn pri pedagogio kaj psikologio. Kiel en la plej multaj landoj, ankaŭ en Hungario – konforme al la psikologiaj bezonoj de la 6-10 jaraj infanoj – en la komencaj klasoj de la ĝeneralaj lernejoj ĉiun lernobjekton instruas la sama instruisto. Tiu fakto metas tre altajn postulojn por la estontaj instruistoj. Antaŭ ĉio ili devas havi emocian alligitecon al la malgrandaj infanoj (tio estas nepra antaŭkondiĉo de la sukcesa laboro), kaj ili devas akiri sufiĉe profundajn konojn el ĉiuj sciencobranĉoj. Do, dum ekzemple gimnazia fakinstruisto pri matematiko kaj fiziko povas „senpune" malhavi eĉ bazajn konojn pri biologio, instruisto en la unua aŭ dua klaso de la ĝenerala lernejo neniel rajtas permesi tion al si. Tio rezultigas, ke la porinstruistaj altlernejoj postulas de siaj studentoj tre multflankan interesiĝon, ja ili devas kun la sama ŝato okupiĝi pri kemio, fiziko, matematiko, artoj aŭ pri la gramatiko de la gepatra lingvo.

Tamen, tio en la praktiko ne ĉiam estis perfekte plenumebla tasko. Krome naskiĝis ankaŭ la bezono, ke en la tria kaj kvara klasoj realiĝu jam parte faka instruado, t.e. ke difinitajn lernobjektojn instruu instruistoj, specialiĝintaj pri la koncerna fako. Tial en la porinstruistaj altlernejoj oni enkondukis t.n. specialajn kursojn. En la nuna momento ekzistas specialaj kursoj pri rusa lingvo, kanto-muziko, desegnado, korpedukado, teknikaj konoj, bibliotekaj konoj kaj popolklerigado. Ĉiu studento elektas unu el tiuj kursoj, kaj – kompreneble kun la alproprigado de la ĝeneralaj konoj pri ĉiuj aliaj lernobjektoj – ricevas pli profundan instruadon pri la elektita fako. Tiu sistemo montriĝis tre utila precipe ĉe kanto-muziko kaj desegnado, ja por la spertiĝo en tiuj fakoj necesas ankaŭ certagrada denaska kapableco.

Dum la pasintaj dudek kvin jaroj la porinstruistaj altlernejoj plene integriĝis en la supera instruado de Hungario. La studentoj de tiuj ĉi altlernejoj ofte atingas ŝatindajn rezultojn en diversaj tutlandaj sciencaj konkursoj de studentoj, tiamaniere akirante renomon ankaŭ por sia altlernejo. La porinstruistaj altlernejoj havas avangardan rolon ankaŭ en la instruado de Esperanto – plurloke funkciis kaj funkcias seriozaj lingvokursoj.

Laŭ la nombro de la studentoj la plej granda porinstruista altlernejo funkcias en Budapeŝto: meze de aprilo per solene aranĝitaj „altlernejaj tagoj" oni primemoris ĉi tie la arĝentan jubileon de porinstruistaj altlernejoj. Kiel al ĉiuj altlernejoj, ankaŭ al tiu ĉi apartenas ĝenerala lernejo, en kiuj la studentoj plenumas sian instrupraktikon. Estas menciinde, ke la direktoro de tiu ĉi ĝenerala lernejo estas aktiva esperantisto, s-ino Mária Bereczki. Kaj en la Budapeŝta Porinstruista Altlernejo laboras ankaŭ la aŭtoro de tiu ĉi artikolo, kiel docento de la katedro pri lingvoj kaj literaturo.

La kvaronjarcenta laboro de la porinstruistaj altlernejoj estas nepre pozitiva. Rezulte de ilia laboro, la etuloj transpaŝinte la sojlon de la lernejo renkontas instruistojn pli klerajn, kaj tiu fakto certe favore influas iliajn ŝancojn por havi sukcesan vivon.

Vilmos *Benczik*

Budapeŝta Porinstruista Altlernejo

JOHANO LA BRAVA

„Johano la Brava" estas popolfabelo en versoj, unu el la plej popularaj verkoj de la hungara poeto Sándor Petőfi (1823-1849). Ĝi estas iom konata ankaŭ en Esperantujo: jam tri fojojn ĝi aperis en la majstra traduko de Kálmán Kalocsay; propre en 1923, 1948 kaj 1970 (laste en la volumo „Libero kaj amo"). Nun Hungara Esperanto-Asocio decidis aperigi kvaran eldonon, kiu eliros plimalpli samtempe kun tiu ĉi revunumero. Ĉi-sube ni prezentas el ĝi specimene la dekkvaran ĉapitron, en kiu Johano rakontas al la francaj reĝo kaj reĝidino sian vivhistorion, kaj rifuzas la allogan inviton okupi la francan tronon kaj edzinigi la belan reĝidinon.

Johano la Brava. Popolfabelo en versoj. Tradukis Kálmán Kalocsay. Postparolo de Vilmos Benczik, frontpaĝa desegno de Ádám Würtz. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1984. 21 cm. 60 p. ISBN 963 571138 7 Prezo: 12,- ned.gld.

XIV.

«Kiel mi komencu? Do, en ord' laŭvica,
Kiel mi akiris nomon Kukorica*?
En la maizkampo mi trovita estis,
Tial per ĉi nomo oni min survestis.

La edzin' bonkora de farmulo volis,
Kiel ŝi multfoje pri tio parolis,
Eklabori sur la kampo de maizo,
Jen ŝi min el sulko trovis, en ĉemizo.

Ŝi min ekkompatis, ĉar mi ŝrikis ege,
Levis min kaj prenis sur la brakojn flege,
Kaj, hejmenirante, faris la decidon:
«Jes, mi lin edukos, mi ne havas idon.»

Sed koleran, krudan edzon ŝi ja havis,
Kaj apero mia tiun ne tro ravis,
Hej, kiam min hejme tiu hom' ekvidis,
La blasfemojn buntajn dense li recitis.

Ŝi lin pacigante petis por tolero:
«Paĉjo, do ne grumblu, ĉesu la kolero!
Se mi en pereo lasus lin sen koro,
Povus mi esperi helpon de l' Sinjoro?

Krome li ne sidos ĉe la dom' senfare,
Vi ja havas farmon, bovojn, ŝafojn are.
Se l' estaĵo orfa kreskos, vi ricevos
Helpon, kaj ŝafiston dungi vi ne devos.»

Fine, malfacile, iel ja li cedis,
Sed rigardon bonan al mi ne tre ĵetis.
Se ne iris ĉio laŭ la ord-reguloj,
Mia dors' pleniĝis tuj per blu-makuloj.

Do mi kreskis inter batoj kaj laboro,
Ĝojon tre malmultan havis mia koro.
Mia tuta ĝojo estis dum junaĝo
Bela knabineto blonda en vilaĝo.

Ŝia kara panjo mortis jam tre frue,
Ŝia patr' edziĝis poste ankaŭ due.
Ankaŭ lin forrabis baldaŭ la destino,
Venis ŝi sub zorgon de la stifpatrino.

Sola ĝojo estis tiu knabineto,
Sola roz' en mia dorna viv-vegeto.
Kiel mi en amo kaj admiro dronis!
«Orfoj de l' vilaĝo» oni nin alnomis.

Ho, mi ŝian vidon, jam kiel infano,
Estus ne doninta por kazea flano.
Kia ĝojo estis, se mi en festtagoj
Povis kun ŝi ludi inter la geknaboj.

Kaj eĉ, kiam haroj ĝermis sur la lipoj,
Kaj pikpikis, ŝiklis io sub la ripoj,
Hej, se mi ŝin kisis, se ŝi min karesis,
Eĉ mondrenversiĝo min ne interesis.

Multe ŝin turmentis ŝia stifpatrino,
Dio ne pardonu ŝin pro ŝia krimo,
Kiu scias, kion farus ŝi inside,
Se ŝin per minacoj mi ne tenus bride.

Ankaŭ mia vivo iĝis viv' de hundo,
Kiam la virinon ni al terprofundo
Metis, kiu iam trovis min, kaj, vere,
Pli ol naskpatrino zorgis min sincere.

Krudas mia koro, dum la vivo tuta
Mia vang' apenaŭ estis larmo-guta.
Sed nun, sur la tombon de l' edukpatrino
Falis miaj larmoj kiel pluv', sen fino.

Ankaŭ Ilnjo, tiu orfulin-kolombo,
Ne ŝajnige ploris apud ŝia tombo,
La animo bona, al ĉiel' fluginta,
Helpis ja laŭeble al la kompatinda.

Ofte ŝi diradis: «Nur atendu, karaj,
Se la temp' alvenos, mi vin faros paraj,
Kia par' vi estos! miros vilaĝanoj!
Nur atendu iom, nur atendu infanoj!»

Sándor Petőfi (1823–1849)

Pene ni atendis, ke la temp' alestu,
Estus ŝi farinta, Dio mem atestu,
Ĉar ŝi ĉiam tenis sin al sia vorto,
Ve, sed ŝi jam dormis dormon de la morto.

Poste nun, post tio, ke ŝi morti devis,
Ĉiuj sapvezikoj de l' espero krevis.
Tamen en ĉi tiu stato malespera
Daŭre firma restis nia amo vera.

Ho, sed Dio havis por ni alian volon,
Prenis eĉ ĉi tiun tristan kor-konsolon,
Jen, mi perdis parton de l' ŝafar' gardata,
Min forpelis mia mastro senkompata.

Adiaŭon diris mi al Ilnjo kara,
Al la mond' ekiris kun anim' amara,
Migris vagabonde, migris mond-duonon,
Fine mi surmetis soldat-pantalonon.

Ja neniam petis Ilnjon mi per diro:
Ŝi ne donu koron al alia viro,
Nek ŝi de mi petis: restu mi fidela,
Sciis ni: fidelo restos senŝancela.

Do min ne pretendu, bela reĝidino,
Ĉar se de mi Ilnjon rabas la destino,
Plu knabina amo al mi ne necesos,
Eĉ se min la morto tute priforgesos.»

——— ** — ** ———

Petőfi en fremdaj lingvoj

Sándor Petőfi certe estas la plej konata hungara poeto ekster la etnaj limoj de la hungara lingvo. Inter la jaroj 1846–1960 aperis liaj 770 poemoj en 50 lingvoj – la nombro de ĉiuj tradukoj sumiĝas je ĉirkaŭ 20 000. Mem Johano la Brava *aperis en ĉiuj gravaj Eŭropaj lingvoj, kaj krome ankaŭ en gravaj ekster-eŭropaj, kiel la ĉina. Estas menciinde, ke la traduko en la ĉinan lingvon estis farita el la Esperanta traduko de K. Kalocsay.*

Petőfi-tradukoj ankaŭ nuntempe aperadas dise en la mondo. Ni esperas, ke la nuna reeldono de „Johano la Brava" instigos kelkajn legantojn esplori, kio de Petőfi legeblas en ilia gepatra lingvo?

PRI LA HUNGARA EKONOMIA REFORMO

Dum la lastaj jaroj ĉiam pli abunde legeblas artikoloj en la eksterlanda gazetaro pri la ŝanĝoj en la hungara ekonomio. Tio koncernas kaj la gazetaron de socialismaj landoj, kaj la grandajn gazetojn de la evoluintaj kapitalismaj landoj. Tamen, tiuj ĉi artikoloj plej ofte reagas al iu konkreta nova reformo, lasante en ombro la tutan reforman procezon. Ĉi-sube ni provos doni birdokulan superrigardon pri la tuta reforma procezo, sed por tio necesas resalti en la tempo kelkajn jardekojn.

Alŝtatigo kaj sukcesoj

Kiam en la jaroj 1948-1949 estis alŝtatigita praktike la tuta industrio, tio samtempe signifis ankaŭ gravan koncentriĝon. Ofte el 5-10 malgrandaj privataj uzinetoj estis kreita unu ŝtata entrepreno, funkcianta sub rigora centra direktado, kaj obeanta al la postuloj de tutlanda centra planado. Tiu struktura ŝanĝo efikis tre pozitive al la kvanto de la produktado, dum la unuaj du-tri jaroj la ekonomia progreso estis vere okulfrapa. Jes ja, sed la granda progreso ŝuldiĝis al la mobilizo de la rezervoj, kiuj inter la cirkonstancoj de la pli frua merkata anarkio kaj organiza diserigiteco ne povis valdiĝi, kaj post du-tri jaroj tiuj rezervoj elĉerpiĝis. Tion ne konsciis la tiama ekonomia kaj politika gvidantaro de la lando, kaj en la ekonomiaj planoj ankaŭ dum la pluaj jaroj ili antaŭvidis tre grandajn ampleksiĝojn de la produktado. Tio povis sukcesi nur koste de la malpliiĝo de la loĝantara konsumado, kaj la vivnivelo de la hungara popolo grave refalis dum tiuj jaroj. Krome, la intensa investada politiko havis fakte nur *kvantan* emfazon, kaj, ĉar la merkato ne povis plenumi sian reguligan funkcion, kreskis la manko de pluraj varoj, dum aliaj ŝimis nevendeblaj en la deponejoj. Sed en la tiama ekonomia sistemo la debito de iu varo praktike ne influis la financojn de la produktinta entrepreno.

La reformoj ekis en 1957

Ĉar la nova politika gvidantaro bone konsciis, ke inter la kaŭzoj de la eksplodo de la kontraŭrevolucio okupis ne neglektindan lokon ankaŭ la pli frua malĝusta ekonomia politiko, jam en la jaro 1957 estis faritaj la unuaj paŝoj por kompleksa ekonomia reformo. La bazaj ideoj estis certagrada rehabilito de la merkato, por uzi ties nemanipuleblajn prijuĝojn ĉe la kunmeto de la ekonomiaj planoj, kaj aliflanke, ellabori sistemon, kiu dependigas la enspezojn de la produktantoj ne nur de la kvanto, sed ankaŭ de la kvalito kaj merkata debito de la produktitaj varoj.

Tamen, inter la cirkonstancoj de la politika konsolidiĝo kompleksaj reformoj ne povis disvolviĝi, krom en la agrikulturo, kie la anomalioj estis la plej grandaj. Oni ĉesigis la sistemon, laŭ kiu ĉiu agrikultura produktanto leĝe devis vendi al la ŝtato la plimulton de la produktitaj varoj je tre malalta prezo. Ĉe la agrikulturaj varoj oni enkondukis la sistemon de reguligita, tamen esence libera merkato, kio indigis por la produktantoj ampleksigi la kvanton kaj kreskigi la kvaliton de la produktitaj varoj. Krome, en tutlanda skalo la pli frue neglektita agrikulturo ricevis la necesajn sumojn por investado, kaj la teknologia nivelo de la agrikultura produktado grave kreskis.

Samtempe en la industrio kaj komerco okazis nur sporadaj reformoj, la esenco de la sistemo estis sensanga. Diferenco inter la enspezoj de bone kaj malbone laborantaj entreprenoj praktike malestis. La centra ŝtata kaso disponigis al ĉiu entrepreno la necesajn financojn, kaj forprenis ĉiujn ĝiajn enspezojn. La salajroj de laboristoj kaj direktoroj estis sendependa de la rentabilitato de la produktado en la koncerna uzino.

1968 – ŝlosila jaro

La unuan de januaro 1968 startis la tn. „nova ekonomia mekanismo", kiu enkondukis drastajn ŝanĝojn ĉefe en la industrio kaj la servoj. La esenca trajto de la nova sistemo estis kreo de intima ligo inter la debito de la produktitaj varoj kaj la salajroj en la produktinta entrepreno. Krome, oni ŝanĝis ankaŭ la sistemon de la fiksitaj prezoj, kiu sistemo grave malhelpis jam la altiĝon de la kvalito de la industria produktado, kaj ankaŭ la ampleksiĝon de la servoj. La ŝanĝoj estis enkondukitaj poiome; ekz. ĉe la prezoj oni kreis tri kategoriojn, tiun de „fiksitaj prezoj", „maksimumigitaj prezoj" kaj „liberaj prezoj". Al tiu ĉi lasta kategorio apartenis tiutempe ĉ. 20 procentoj, kaj nun 80 procentoj de la varoj kaj servoj.

La nova sistemo denove liberigis tre multajn latentajn energiojn. La loĝantaro tion sentis ĉefe per la grava pliboniĝo de la diversaj servoj (riparado, restoracioj ktp.). Inter la industriaj entreprenoj komenciĝis signifa diferenciĝo, kaj per tio ankaŭ diferenciĝo de la salajroj. Kaj ĝuste tio provokis malplaĉon ĉe sufiĉe vastaj tavoloj de la loĝantaro, ja oni vidis endanĝerigita unu el la ĉefaj trajtoj de la socialismo: la *ekonomian egalecon.*

Tiuj tavoloj premis la politikan gvidantaron iom post iom repreni multajn reformojn – tio okazis ĉefe en la jaroj 1971-1972. Ankaŭ la tiama internacia ekonomia klimato kreis favorajn cirkonstancojn por tio: en la internacia merkato la prezoj de materialoj kaj energio estis malaltaj, dum la produktaĵoj de la prilabora industrio havis relative altan preznivelon. Do, la hungara ekonomio povis relative bone sukcesi ankaŭ sen la raciigaj

efikoj de la reformoj. Tamen, oni devas diri, ke la retropaŝo ne estis kompleta: pluraj esencaj reformoj ne plu estis repreneblaj.

Naftokrizo kaj enŝuldiĝo

Kaj venis la jaro 1973 kun la naftokrizo, kaj poste ankaŭ la altiĝo de la prezo de preskaŭ ĉiuj krudmaterialoj. Kiel Hungario reagis al tiuj eventoj? Nun ni scias jam, ke ne tre prudente La enlanda prezo de la energio kaj krudmaterialoj esence ne ŝanĝiĝis, la ŝtata buĝeto per kreskantaj subvencioj tenis ilin je tre malalta nivelo. La ekonomia gvidado verŝajne ne kredis, ke la alta internacia preznivelo de nafto kaj aliaj krudmaterialoj povos resti daŭra; tio tamen estas iom kurioza afero, ja samtempe la hungara amaskomunikado ĉiutage demonstris, ke la eksploda prezaltiĝo estas ne manifestiĝo de politika histerio de la arabaj landoj, sed logika postsekvo de longdaŭra malekvilibro inter la prezoj de energio kaj krudmaterialoj unuflanke, kaj tiuj de la produktaĵoj de la prilabora industrio aliflanke. Ĉiukaze, post 1973 en Hungario nenio ŝanĝiĝis: daŭris la ampleksa investada aktiveco, la vivnivelo daŭre kreskis, dum la kresko de la efektiva nacia enspezo ne donis bazon por ĉio ĉi. La ŝtato abunde uzis eksterlandajn pruntojn, tiom pli, ke ili estis akireblaj tre facile kaj je tre favora interezo. (La kirasŝrankoj de la okcidentaj bankoj tiutempe ŝvelis de naftodolaroj.) La hungara ekstera komerco havis ĉiam pli grandan deficiton: en 1978 jam pli ol unu miliardon da dolaroj.

Fine de tiu ĉi sama jaro la plej alta partia kaj ŝtata gvidantaro decidis, ke necesas esenca ŝanĝo en la hungara ekonomia politiko.

Sur novaj vojoj

Estis nature, ke oni devis revivigi la esence bonajn principojn de la ekonomia reformo de 1968, sed nun la cirkonstancoj estis nekompareble malpli favoraj, ol antaŭ dek jaroj. Hungario havis grandajn repagendajn ŝuldojn, kaj ankaŭ la internacia politika klimato malboniĝis. Tamen, tiu fakto havis ankaŭ favoran aspekton – la reformoj ne plu estis prokrasteblaj. Kio do okazis post 1978? Multo. La prezoj ŝanĝiĝis – altiĝis aŭ malaltiĝis – ili pliproksimiĝis al la internacia preznivelo kaj la efektivaj produktokostoj, kaj tiamaniere ili pli efike orientis la aĉetantojn: kaj la entreprenojn, kaj la loĝantaron mem. Tiu ĝusta orientiĝo grave reduktis la pli fruan malŝparadon.

La du ĉefaj celoj de la ekonomia politiko dum la lastaj 5-6 jaroj estis la konservo de la pagkapableco de Hungario, kaj la konservo de la vivnivelo, atingita ĝis 1978. La unua

„Poŝ-sondo" – titolpaĝo de la populara revuo „Semajna Mondekonomio"

celo ĝis nun sukcese plenumiĝis – Hungario bonorde kaj ĝustatempe repagas siajn ŝuldojn. Plenumiĝis ankaŭ la dua celo, tamen, la reala valoro de la salajroj iom reduktiĝis, aliflanke grave kreskis la socialaj elspezoj. Jen, kelkaj ciferoj el la jaro 1983; la bazo de la komparo – 100 procentoj – estas la jaro 1979.

Nacia enspezo:	105,7
Enlanda uzo de la nacia enspezo:	95,3
Loĝantara konsumado:	105,6
Reala salajro:	95,4
Akumulado (investoj):	50,0

Malgraŭ la atingitaj rezultoj ne mankas problemoj. Pro la necesa limigo de la importo la teknologia nivelo de la industrio ne povas kreski en la dezirata ritmo. La agrikulturo produktas fidinde, Hungario fariĝis signifa eksportanto de nutraĵoj, sed la produktokostoj estas altaj. En la industrio ĝis nun ankoraŭ ne estis tiritaj ĉiuj konkludoj de la reformo, daŭre ekzistas entreprenoj, kiuj ne kapablas funkcii konvene al la merkataj postuloj, kaj ili povas ekzisti nur kun altaj ŝtataj subvencioj, kies fonto estas kompreneble la imposto pagita de la bone funkciantaj entreprenoj.

Socialaj kaj politikaj aspektoj

Tiajn entreprenojn – almenaŭ el ekonomia vidpunkto – plej prudente estus lasi bankroti. Jes ja, sed en ili laboras pluraj centmiloj da laboristoj, por kiuj ne eblus krei novajn laborlokojn. Kaj la rajton pri laboro garantias la hungara konstitucio; senlaboreco estus neakceptebla por la mentaleco de la hungara publika opinio. Ankaŭ la sindikatoj emfaze deklaris, ke ĉiu laborkapabla homo devas havi laboron, tion ili konsideras esenca trajto de la socialisma ordo. Do, la validigo de la reformaj principoj en la industrio povas okazi nur iom post iom. La ŝtata buĝeto por 1984 antaŭvidas preskaŭ 20 procentojn de la elspezoj doni kiel rektan subvencion al la entreprenoj, sed tre verŝajne fluos al ili ŝtata mono ankaŭ en nerekta formo (okaza redukto de impostoj ktp.).

Interesa estas ankaŭ la politika aspekto de la ekonomia reformo. Kiel estas konate, ĝi donis relative vastan terenon al la individua entreprenemo, speciale sur la kampo de servoj (abundas privataj restoracioj, butikoj ktp.), sed ankaŭ en la industrio. Tiuj privataj entreprenetoj ne havas super si ŝtatan ŝirmon: ili povas bankroti, sed ankaŭ multe gajni. Kaj la publika opinio ne facile akceptas, ke per tio multe kreskas la diferenco inter la personaj enspezoj: la membroj de tiuj prosperantaj entreprenetoj ofte gajnas pluroblon de la meza monatsa-

HONORIGO DE MERITPLENAJ ESPERANTISTOJ

La ĉi-jara Delegita Kunveno de Hungara Esperanto-Asocio okazis la 14-an de aprilo en Budapeŝto. Dum tiu ĉi Kunveno estis transdonitaj distingoj al pluraj esperantistoj pro ilia rezultoplena laboro en la Movado, kaj speciale pro la aktiva partopreno en la organizado de la 68-a Universala Kongreso de Esperanto kaj de la 39-a Internacia Junulara Kongreso.

La *Nacia Konsilio de Sindikatoj* donacis la **Oran Gradon de la Distinga Insigno «Pro Sindikata Laboro»** al d-ro Imre *Pethes*, vicprezidanto de HEA kaj al Tibor *Vaskó*, sekretario de HEA; la **Arĝentan Gradon de la Distinga Insigno «Pro Sindikata Laboro»** al Péter András *Rados*, komitatano de HEA, al István *Mészáros*, ĉeflibrotenisto de HEA kaj al Oszkár *Princz*, organiza sekretario de HEA. La distingojn transdonis Károly *Palotai*, vicprezidanto de la Nacia Konsilio deSindikatoj.

La *Ministro pri Klerigo* donacis la distingon **«Pro Elstara Laboro»** al Zsuzsa *Barcsay*, gvidanto de la Instrua Komisiono de HEA kaj al d-ro István *Szerdahelyi*, komitatano de HEA; la distingon **«Pro Socialisma Kulturo»** al d-ro Vilmos *Benczik*, estrarano de HEA kaj al Sándor *Jakab*, estrarano de HEA. La distingojn transdonis Sándor *Kormos*, ĉefsekciestro de la Ministerio pri Klerigo.

La *Nacia Konsilio de la Patriota Popolfronto* donacis la **Distingan Insignon de la Patriota Popolfronto** al Elizabeta *Pallós*, estrarano de HEA kaj al d-ro Árpád *Máthé*, estrarano de HEA. La distingojn transdonis Róbert *Juhász*, sekciestro de la Nacia Konsilio de la Patriota Popolfronto.

La *Nacia Konsilio de Paco* donacis la **Distingan Insignon de la Pacmovado** al Ada *Csiszár*, estrarano de HEA. La distingon oni transdonis en majo, en la sidejo de la Nacia Konsilio de Paco.

La *Centra Komitato de Hungara Komunisma Junulara Asocio* donacis la **Orkronan Insignon de Hungara Komunisma Junulara Asocio** al Imre *Szabó*, estrarano de HEA kaj al László *Szilvási*, sekretario de Hungara Esperanto-Junularo; **Memordiplomon de Hungara Komunisma Junulara Asocio** al la junularaj aktivuloj Gabriella *Bauer*, András *Lukács*, József *Madaras*, kaj Orsolya *Zombori*. La distingojn transdonis László *Tunyogi*, sekciestro de la Centra Komitato de Hungara Komunisma Junulara Asocio.

La *Estraro de Hungara Esperanto-Asocio* donacis la medalon **«Pro Esperanto»** al d-ro Endre *Baráth*, ĉefsekretario de HEA, al Éva *Farkas-Tatár*, estrarano de HEA, al d-ro József *Pál*, estrarano de HEA, kaj al Grégoire *Maertens*, prezidanto de UEA. La distingojn transdonis d-ro Imre *Pethes*, vicprezidanto de HEA. Al s-ro Grégoire *Maertens* la distingo estis transdonita okaze de lia vizito al Budapeŝto, fine de aprilo.

La *Estraro de Hungara Esperanto-Asocio* donacis la **Bronzan Memormedalon de la 68-a UK** al Béla *Kevevári*, ĉefkunlaboranto de la Nacia Konsilio de Sindikatoj, Kálmán *Szabó*, aktoro, membro de Hungara Esperanto-Teatro, al Marianna *Rieth*, estrarano de HEA, al Margit *Evva*, komitatano de HEA, kaj al d-ro Péter *Broczkó*, komitatano de HEA.

Nia Redakcio kore gratulas al ĉiuj distingitoj, kaj deziras al ili pluan sukcesan laboron en la Esperanto-Movado!

---

lajro, tamen, ne per 8-hora, sed 12-16-hora laboro ĉiutage.

Momente ankoraŭ nur teoriajn dilemojn lanĉas la fakto, ke la ekonomia gvidado de la lando provas utiligi la tiel akumuliĝantajn personajn kapitaletojn por investadaj celoj, per la emisio de valorpaperoj (pli-malpli similaj al akcioj, sed havantaj alian nomon). Ja estas fakto, ke tiamaniere la posedantoj povas akiri enspezon sen laboro.

Levas socialajn problemojn la jare ĉ. 8 procenta inflacio. Tiu inflacio havas ankaŭ psikologian aspekton, ja la hungara loĝantaro dum jardekoj kutimiĝis al fiksaj prezoj. Tamen, la problemoj estas pli ol psikologiaj por la pensiuloj kaj por familioj kun infanoj.

Alia politika aspekto estas la malharmonio inter la pli-malpli reformita ekonomio kaj la ŝtata instituciaro, kiu kreiĝis en la epoko de la centra ekonomia direktado. Ĉiam pli ofte la gazetaro lanĉas la neceson de konformaj reformoj ankaŭ sur tiu kampo.

Kiel videble, la vojo de la ekonomiaj reformoj ne estas glata. Mankas preta recepto, la hungara popolo devas trovi la manieron de la plej efika disvolvo de la socialisma popolekonomio per eksperimentoj je la propra kosto. Solidan bazon por tiu ĉi malfacila eksperimentado donas la socia trankvilo kaj la harmonio inter la popolo kaj ĝiaj gvidantoj; la ĝisnunaj sukcesoj prave povas veki esperon pri la estonto. Vilmos *Benczik*

D-ro Imre Pethes, prezidanto de MEM, membro de la Monda Packonsilio kaj tiu de la Hungara Nacia Packonsilio

ESPERANTISTA PACRENKONTIĜO EN PARDUBICE

Fine de marto kunvenis multaj esperantistoj en la Ĉeĥoslovakia urbo Pardubice por demonstri, ke paco estas la plej valora trezoro por esperantistoj, ja internacia interkompreniĝo, por kiu luktas la uzantoj de Esperanto jam dum preskaŭ jarcento, eblas nur inter pacaj cirkonstancoj. Reprezentiĝis en Pardubice dek du landoj: Aŭstrio, Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Federacia Respubliko Germanio, Francio, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Nederlando, Pollando kaj Sovetio. En la impona kunveno de la esperantistaj pacamantoj partoprenis ankaŭ pluraj Ĉeĥoslovakiaj ŝtataj gvidantoj, kaj elstaraj reprezentantoj de la Ĉeĥoslovakia socia vivo.

La Hungara Nacia Packonsilio sendis salutleteron al la 6-a Internacia Esperantista Pacrenkontiĝo. La leteron prezentis al la kunveno *d-ro Imre Pethes,* prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado, membro de la Hungara Nacia Packonsilio kaj tiu de la Monda Packonsilio.

Hungara Nacia Packonsilio

SALUTO DE LA HUNGARA NACIA PACKONSILIO AL LA PARTOPRENANTOJ DE LA 6-A INTERNACIA ESPERANTISTA PACRENKONTIĜO EN PARDUBICE

En la nomo de la Prezidio de la Hungara Nacia Packonsilio kun respekto kaj amikeco ni salutas Vin, la partoprenantojn de la 6-a Internacia Esperantista Pacrenkontiĝo.

Ni kredas, ke tiu ĉi jam tradicia aranĝo inde simbolas la intiman kunapartenon de la Esperanto-Movado kaj de la klopodoj konservi la pacon; ĝi simbolas ankaŭ la komunajn celojn, kaj tiun konvinkiĝon, ke baza kondiĉo de la paco estas daŭra dialogo inter la popoloj, kaj ilia reciproka konatiĝo. Efika ilo por atingi tiun ĉi celon estas la komuna lingvo, por kies disvastigo senlace luktas la esperantistoj.

Ni estas konvinkitaj, ke la 6-a Internacia Esperantista Pacrenkontiĝo faros sian laboron en la spirito de la monda pacrenkontiĝo, okazinta pasintjare en Prago, kaj ĝi kontribuos al la malpliigo de la internacia streĉiteco, kaj al la konservado kaj evoluigo de la atingaĵoj de la malstreĉiĝo.

Karaj Geamikoj, ni deziras al Vi rezultoplenan laboron, kaj tion, ke tiu ĉi renkontiĝo atingu similajn sukcesojn, kiel la antaŭa.

Budapeŝto, la 15-an de marto 1984.

Nándorné Sebestyén
prezidanto

Miklós Barabás
ĉefsekretario

ORSZÁGOS BÉKETANÁCS
CONSEIL HONGROIS DE LA PAIX
[illegible]

AZ ORSZÁGOS BÉKETANÁCS ÜDVÖZLETE A VI. PARDUBICEI NEMZETKÖZI ESZPERANTÓ BÉKETALÁLKOZÓ RÉSZTVEVŐINEK

Az Országos Béketanács Elnöksége nevében tisztelettel és barátsággal köszöntjük Önöket, a VI. Pardubicei Nemzetközi Eszperantó Béketalálkozó résztvevőit.

Úgy véljük, hogy ez az immár hagyománnyá váló rendezvény méltóképp fejezi ki az eszperantó mozgalom és a béke fenntartására irányuló törekvések szoros összetartozását, közös célkitűzéseit, és azt a meggyőződést, hogy a béke megőrzésének alapvető feltétele a népek közötti folyamatos párbeszéd, egymás kölcsönös megismerése. E cél megvalósításának hatékony eszköze a közös nyelv, amelynek elterjesztéséért az eszperantisták fáradhatatlanul küzdenek.

Meggyőződésünk, hogy a VI. Pardubicei Nemzetközi Eszperantó Béketalálkozó a mult évben Prágában megrendezett béke-világtalálkozó szellemében folytatja majd munkáját, és hozzájárul a nemzetközi feszültség csökkentéséhez, az enyhülés vívmányainak megőrzéséhez és továbbfejlesztéséhez.

Kívánunk Önöknek, kedves Barátaink, eredményes munkát, és azt, hogy ez a találkozó az előzőekhez hasonló sikerrel záruljon.

Budapest, 1984. március 15.

Sebestyén Nándorné
elnök

Barabás Miklós
főtitkár

METALLOGLOBUS

TÉPA TEGMENT–FENESTRO

Rekomendata por subtegmentan ejon utiligontoj!



La tegment-fenestro estas el ligno, ekstere kovrita per profiloj fleksitaj el zinklameno, termoizole vitrita, glita unuklapa fenestro-sistemo.
La tegment-fenestro estas enkonstruebla en tegmenton kun klino de 30-60 gradoj.

Dimensioj: 85 x 115 cm
85 x 150 cm

VENDAS:

METALLOGLOBUS Komerca Entrepreno de Metalvaroj kaj Produktiloj
Vendejo de metalaj konstru-varoj
BUDAPEST, XIII. Dózsa György út 57. T: 208–420

István Nemere

La subtegmentejo

„Mi faros tion, se alvenos la tago de mia morto" – diradis ofte Jozefo. Kiam oni volis, ke li aranĝu iun malagrablan aferon, aŭ kiam li ne emis labori. Same estis rilate la nuksojn. La edzino jam centfoje diris: „Vi povus jam suprenporti la nuksojn al la subtegmentejo, Jozefo. Ekde la pasinta aŭtuno ili ŝimas sub la eskalo. Kvin minutojn tio tio kostas, Jozefo." „Nu, bone – respondadis tiam Jozefo – mi suprenportos ilin..." El la aŭtuno fariĝis vintro, poste degelis la glacio, poste... Jozefo ne ŝatis la eskalon, li estis jam tro maljuna por la ŝtupoj. Sepdek tri jaroj, tio ne estas malmulte. La sako kun la nuksoj ankoraŭ eĉ printempe staris tie. Kiam alvenis la tempo por aspergi la vinberlaŭbon, alvenis la pli maljuna filo. Ankaŭ al li diris la patrino: suprenportu la sakon, Ladislao. La filo nur murmuretis, sed eĉ ne tuŝis la sakon, kvankam li estis kvardekjarulo, forta viro. Poste maturiĝis la abrikotoj, kaj iom poste ankaŭ la persikoj. Jozefo faradis-laboradis en la ĝardeno, foje-foje portis plenan korbon, uzis la pioĉon.

Fine de septembro jam ekkoleris la edzino. Alvenis ilia plej juna bofilino. Per aŭto. Ĉar ĉitempe eĉ virinoj kondukas tiujn aŭtomobilojn. Longe ili batis per longaj bastonoj la grandan nuksarbon, pleniĝis la herbejo de freŝodoraj malhelverdaj ŝeloj. La bofilino kolektis ĉion en alian sakon, tiris ĝin en la suprenirejon. „Nu, paĉjo, suprenportu kaj dislokigu ilin en la subtegmentejo", kaj ŝi forveturis. Jozefo jam konjektis, kio sekvos. Li kaŝiris al la ĝardeno, observis la brancplektaĵon, ĉu la hundoj ne truis ĝin denove. Sed la voĉo de la edzino eĉ tie atingis lin:

– Jozefo...!

Ĉiam ŝi diris „Jozefo", li memoras. Eĉ dum tiuj florodoraj unuaj noktoj, unuajare. Kaj kiam la ĝendarmoj lin serĉis. „Jozefo ne estas ĉi tie" – diris al ili la edzino, malmolvoĉe, akre. Jozefo kompreneble estis tie, en uniformo kaŝis sin en la kelo, malantaŭ la terpomoj. Vane ili serĉis lin.

– Portu jam tiujn nuksojn al la subtegmentejo, kune kun la pasintjara sako.

Jozefo ne estis pigra. Nur li sentis la pezon de sepdek tri jaroj. Neniam li parolis pri tio kun la edzino. Viro ne plendu. Krome tutvive li malamis la eskalon. Kiam infaneto li estis, ordonis al li la patro iri sur la domtegmenton. Li falis, kaj ekde tiam li eĉ rigardi ne ŝatas eskalojn.

„Poste" – li volis diri, sed la edzino certe ĝuste tion atendis, li vidis tion el ŝiaj okuloj. Kvankam ŝi ne estas malbona edzino... Jozefo laŭte elspiris la aeron, kaj ekiris.

En la suprenirejo lignovermo bruetis ie, ĝi muelis sian lignan vivon. La eskalo staris malrekte, ĝia supra pinto krociĝis al la aperturo de la subtegmentejo. Sur la pasintjara sako verdis ŝimo. Araneo loĝis malantaŭ ĝi. Kiam Jozefo suprenlevis la sakon, ekploris la nuksoj. Peza, li pensis. Eĉ per ambaŭ manoj li apenaŭ sukcesis ĝin levi. La seka saktolo brutale eniĝis en liajn manplatojn.

La angulon de la sako li apogis sur la unuan ŝtupon. Malmulte da loko restis por lia piedo. Li paŝis supren, kaj levis ankaŭ la sakon. Ho, ĝi ne estis malpeza. Kvankam sekis jam la nuksoj, dum jaro ili iom sekiĝis. Jozefo palpetadis la ŝtupojn de la eskalo, ĉu ili elportos lian pezon? Ili ne aspektis putriĝintaj, sed oni neniam povas scii, kion kaŝas la ligno interne.

Iel li sukcesis supreniri. Anhelante li ripozissidis rande de la aperturo. Kelkiuj maljunaj tegoloj krevis, ie eĉ la ĉielo ekbluis. Maljunas jam tiu domo. Ankaŭ ĝi maljunas. Delonge ĝi staras. La lignotraboj en la subtegmentejo jam ne estas angulecaj, la infanoj trivis ilin, kiam ili bredis ĉi tie kolombojn. Antaŭlonge tio okazis, antaŭ tridek jaroj, aŭ tridek kvin? Kaj tiu odoro. Subtegmentej-odoro. Jozefo neniam flaris ĝin aliloke, nur subtegmenteje. Sed ne en tiaspecaj multetaĝaj domegoj en la urbo, kie loĝas liaj filoj, tie oni jam eĉ ne havas subtegmentejojn. Tion oni povas flari nur sub kanotegmento, aŭ sub malnovaj tegoloj. Tie, kie el lignotraboj estas farita la plafono, oni aldonis kano-tavolon, poste morteron kaj fine la farbon. Aliflanke, en la subtegmentejo oni bele disversis iam argilon. Nun jam ĝi ne aspektas tiel bele, pensas Jozefo. Pasis longa tempo de tiam, kiam oni lastafoje argilis ĝin. Ankoraŭ antaŭ la milito. Per ĉaroj oni alveturigis la bonan orflavan argilon, helpis la bofratino kaj ŝia filino. Tiutempe la argiligo de subtegmentejo estis siaspeca familia festeto. Tiom multe da homoj dum unu tago faris ĉion, poste ili manĝis kaj trinkis.

En la korto en granda terkavo ili miksis la argilon kun la grenventumaĵo, kaj per sitelegoj ili suprenportis ĝin. Tiam ne tralikis la plafono, se la vento deŝiris dum pluvo unu aŭ du tegolojn...

En la aero naĝas polvodoro, araneoretoj vibras. La birdoj jam forflugis suden, do ne pepadas la hirundoj. Surpinte de la ŝtonmuro vespoj svarmas. Jozefo jam delonge ne vidis vespejon. Kiam li estis lastafoje en la subtegmentejo? Kiam...? Eble dek jaroj pasis jam. Nun komence li ne volas rigardi al la angulo, poste tamen li turnas la kapon. Jes, tie kuŝas la rompita sledeto. Per ĝi glitis la eta Francisko sub iun ŝarĝaŭtomobilon. Kiomfoje oni diris al li, ke li ne sledu apud la ŝoseo... Li estis la unua nepo. Poste naskiĝis ankaŭ aliaj, pri Francisko ili ne plu parolis. Jozefo tiutage ploris la unuan fojon en sia vivo. Kiu povas scii – eble ankaŭ lastafoje?

Malrapide li iras, li devas klini la kapon, la krucaj stangoj estas malalte. Ankaŭ Jozefo fariĝis lastatempe pli malalta, li iradas fleksiĝinta. Li forviŝas desur vizaĝo la araneoreton. La vespoj plu svarmas.

Staras tie malplenaj kompotujoj grizaj de polvo. Malnova petrollampo, ligna breto, ŝuoj maĉitaj de musoj. Jozefo forfetas la balaaĵon, disverŝas la nuksojn, revenas al la eskalo. Subeniri eskale eĉ malpli li ŝatas. Li jam vidas nebone, sur eskalo tio estas grava afero. Li palpetadas per la piedoj, liaj maljunaj brakoj streĉite tenas la ŝtupojn. Sed li alvenas sukcese.

La alia sako terure pezas. Jes ja, humidaj estas la novaj nuksoj. Ĝeme li levas la sakon, sur ĉiuj ŝtupoj li devas ripozi. Polvo flugas en nazon, ternigante.

La edzino bruas en la kuirejo. Ŝi ne estas malbona edzino, kaj kiel sana! Kvankam sepdekjara, sed ankoraŭ malmulte da receptoj ŝi portis al la apoteko... Tiun sakon li tiras sur la argiltavolo, plugante sulkon. Li anhelas, kiam li sidiĝas apud ĝi. Li disverŝas la nuksojn, tiuj bonodoras, plenigas la aeron en la ejo.

Kaj tiel li sidas ankoraŭ kvaronhoron. La koro jam ne bategas. Li fetas suben la malplenan sakon, ĝemas, ekiras sur la eskalo. Singardeme.

Ekstere okulobatas lin la septembrofina suno, ankoraŭ fortas la lumo. Li palpebrumas, nur staras en la korto. „Jozefo" – diras la edzino – „mi dankas." Kaj ŝi ridetas. Vizaĝo enkaviĝinta, sendenta, arbaro de faldoj, maljuna hepatmakula kampo.

Jozefo staras sur la korto, ankaŭ li ridetas. „Nu, jam bone", li respondas. Liaj ŝultroj estas kliniĝintaj, ofte lia kapo turniĝas. Sepdek tri li havos en novembro.

Clelia Conterno-Guglielminetti (1915–1983)

La krono

Mi sentas min kronita
per stela lumo kaj dorna kratago
dum iras mi en promenado
kune kun vi, infano mia.
Virinoj turnas sin por min rigardi
kvazaŭ komencis mia krono ardi:
eble ĝi estas flama ĝojoplekto,
aŭ en mia okul' brilas reflekto
de la viaj vidintaj Paradizon!
ĝia profund' enfermas
anĝelflugilojn kaj dian rideton:
rideton de Madonoj
en kies brakoj la Infano nestas:
benata estas mi inter virinoj
kaj vi benata mia frukto estas.

Clelia Conterno-Guglielminetti inter siaj lernantoj

La 23-an de januaro 1983 mortis la itala esperantista poetino Clelia Conterno-Guglielminetti. Ŝi havis 68 jarojn. Post pluraj itallingvaj volumoj en 1969 ĉe la Eldonejo Stafeto aperis ŝia poemaro *Eta vivo*, kiu certigas al ŝi elstaran lokon en la Esperanta poezio. Ŝi laboris kiel instruistino en lernejo por infanoj malsanaj je poliomjelito. Ni omaĝas al ŝia memoro per aperigo de du ŝiaj poemoj.

Ede Kabos
(1864-1923)

La vizitantinoj de Maria

Sub rufaj polvonuboj dronis la domoj en Nazareth. La du maljunulinoj, kiuj paŝadis ekde mateno el Kapernaum, jam svenis pro la polvo kaj la naŭze dolĉa odoro de maturiĝantaj figoj. Unu eltornistrigis salitajn fiŝojn kaj donis el ili ankaŭ al la alia por flari, ĉar bezonatis la odoro de salitaj fiŝoj kontraŭ la figoj dolĉaj, kiel romianinoj bezonis aroman oleon, irante al foiro. La virinoj jam rekonsciiĝis de la salitaj fiŝoj, kaj ĉirkaŭrigardis por ekscii de iu, kie troviĝas la domo de la nazaretano.

Ĉe la fosafo ludis senvestaj knaboj. Ili kunligis du lignostangetojn, poste enpikis ilin en la razenan grundon, kaj kantante ĉirkaŭsaltadis ilin. El la maldikaj knabovoĉoj apartiĝis iu moka vorto: „meleĥ... meleĥ." Iufoje knabo altstatura forsaltis el la vico, li surkraĉis la lignostangetojn engrundigitajn, kaj tiam la aliaj knaboj laŭte kantis kun mokrido:

– Reĝo de judoj... reĝo de judoj...

La maljunulinoj el Kapernaum rigardis unu al la alia kaj diris:

– Ili mokas ankaŭ Marian. Ankaŭ Nazareth estas la sama, kiel Kapernaum. Nek Maria, nek ni povas iri surstraten pro la infanoj.

Ili ne kuraĝis demandi la infanojn, kie troviĝas la domo de la ĉarpentisto. Ili piediris plu sur la vojo kaj renkontis ĉe la puto servistinon plorantan. Singarde ili proksimiĝis al ŝi. Kiu ploras, tiu ne ĉagrenas aliajn.

– Kie estas la domo de ĉarpentisto Jozefo? – ili demandis la servistinon.

La knabino levis la kruĉon kaj per ĝi montris al blanka dometo, sur kies verando iu blankharulo okupiĝis apud la rabototablo. La virinoj el Kapernaum ekiris al la blanka domo, dumvoje viŝante sian vizaĝon polvitan per la vestmaniko. Foje-foje ili rerigardis kun suspekto, de kie atingis ilin la moka kanto de la knaboj:

– Meleĥ! Meleĥ!

Ĉe la blanka domo ili jam ne bezonis plu demandadi. Kvankam la blankharulo apud la rabototablo rigardis ilin malaprobe, tamen la virinoj el la pordego jam rimarkis Marian, kiu sidis sur la interna verando kun fleksitaj kruroj, en nigra robo, kaj kun nigra tuko sur la grizaj, hirtaj haroj. Ankaŭ Maria ekkonis la virinojn el Kapernaum; ili kune ploradis sur la Kraniomonto – tiam, tri malfeliĉaj patrinoj. Ŝi nur mansignis, ke ili sidiĝu apude sur la verando.

La vizitantinoj de Maria demetis la suprajn tukojn kaj kaŭriĝis.

Unu ĝemetis por ne komenci paroli.

– Ni vizitis la filojn – diris la alia. – Ni rigardis ankaŭ la tombon de via filo kaj ni kredis, ke ni trovos vin tie.

– Mi malsanas, eĉ iri ne kapablas – sonis la vortoj de Maria el sub la nigra tuko.

Je tio denove ĝemetis la unua virino.

– Ni edukas la filojn por pereo, Maria. Por pereo. Oni penadas; kiel floron, akvumas sian idon per sala likvafo de la larmoj, kaj poste...

La kapo de Maria kliniĝis al la brusto. La blankharulo apud la rabototablo kolereme rigardis la vizitantinojn, ke ili denove lanĉas la parolon pri tiuj filoj, kaj li komencis priformi la lignon per granda ŝtonmartelo, ke ili ne aŭdu bone eĉ la propran diritafon.

La tri virinoj silente sidis kaj atendis, ĝis la ĉarpentisto laciĝas pro la martelado. Tiam elŝprucis la malnova amaro el unu de la vizitantinoj.

– Tamen li ne estis pekema knabo, eĉ se oni lin krucumis. Li min amis, kaj kiu amas sian patrinon, tiu ne povas esti malic-anima. Li estis fiera, jen lia tuta eraro. Se tiam sabate ne estus batinta lin la romia soldato, ankaŭ nun fendus ŝtonon mia filo-animo en la minejo de Kapernaum. Kial do batis lin tiu soldato? Ĉu soldato estas pli homeca homo, ol ŝtonministo? Ĉu al li estas ĉio permesata, ĉar li tenas lancon en la mano? Eĉ per rigardo ne incitis lin mia filo. Li babilis kun knabinoj kaj eĉ ne pensis, ke entute ekzistas soldato. Sed tiaspeca romia lancisto kredas, ke lin piedfrapos kokino, se sabate li ne hontigas fraŭlon antaŭ la knabinoj. Ili promenadas ĉiam tiudirekte, elektas la plej elstaran knabon, kaj batas lin. Kaj la knaboj tion toleras. Nu, mia filo ne toleris. Li kaptis ŝtonon – ja li estis ŝtonministo –, kaj ĝin fetis al la kapo de la soldato. Li trafis lin. Jen la tuto. Kaj pro tio oni lin krucumas, primokas la patrinon, la fratojn... Ho, mia bela, bona filo, mia filo – dronis en amara ploro la vortoj de la vizitantino de Maria.

La ĉarpentisto kolerege marteladis, kaj la tri virinoj vete ploris: unu pli laŭte, ol la alia.

– Ili ploras, ĉiam ploras – murmuris la ĉarpentisto en sian barbon, kaj demetis la martelon, eliris al la landvojo, kaj nur de malproksime li rigardis la virinojn per malicaj okuloj.

Maria suprenrigardis el sub la nigra tuko, kaj el ŝiaj okuloj flugis malgaja rigardo al la ĉielo, kvazaŭ milda kolombo.

– Kaj se li estus malbonega, ĉu oni rajtus forpreni lian vivon? Oni ne scipovas revivigi senkulpan katon, kiun hazarde tretas la piedoj. Oni ne scipovas redoni denton, kiun oni hazarde forbatis el la buŝo de maljunulo. Kaj tiuj kuraĝas murdi homon, ĉar li kulpas! Ĉu revivigi lin oni scipovas, se li senkulpas? Nur Dio rajtas mortigi, ĉar li kapablas ankaŭ doni vivon.

La ĝemanta virino ankaŭ nun ne parolis, je tio ŝi nur suspiris. La alia transprenis la vorton anstataŭ ŝi:

– Sed eĉ la filo de Mirjam ne pekis.

La ĝemanta virino jesis, ke estas tiel.

– Li ne estis peka, nur ruĝa. Li estis plenruĝa la povrulo kaj kurbadorsa. Kaj vane mi persvadis lin, ke li estas bela, ke ankaŭ la ĉielo pleje belas, kiam ĝi ruĝas, kaj ke junaj knabinoj ŝatas ludi sur la dorso de monto, kvankam ankaŭ ĝi estas kurba, mia kompatinda filo poste gapis min, kvazaŭ mi mokus pri li, kiel la infanoj, kiel aliaj, kiel ĉiuj. Ĉar oni primokis mian povran filon, tial li fuĝis de la homoj, kaj kiam li fuĝis de ili, li estis ankoraŭ bona, ja li fuĝis, ke la malespero ne devigu al li ŝtonon preni en la manon, ke li ne venĝu kontraŭ la mokantoj. Se nur estus la homoj bonaj kaj lasus lin fuĝi! Sed ili ne lasis. Ili postkuris lin, plu mokis lin. Tiel li fuĝis en la nokto kaj fariĝis ŝtelisto, por ke oni ne moku lin, kiam li serĉas sian nutron. Ŝtelisto li fariĝis, ŝtelisto. Se li estus bela, kiel via filo, Maria, neniam li irus al pendumilo.

Maria rigardis antaŭ sin. Obtuzaj voĉoj eliĝis inter ŝiaj dentoj:

– Ĉiujn oni murdas, ĉiujn.

Ŝi leviĝis de la verando, malrapide iris al la pordego kaj kriis al la kolerema ĉarpentisto:

– Mia sinjoro, malbela nigra birdo sidas sub la blanka degutejo de viaj okuloj. Kial vi koleras?

– Ankaŭ tiuj alportas siajn larmojn – li grumblis, sed jam ne estis tiom kolera.

– Kial ili ne alportu? – diris Maria kviete. – Se ĉiuj patrinoj plorus kune kun mi, nur la larmoj pli abundus, ne la sufero estus pli granda. Kaj iliaj filoj estas iliaj filoj. Al ili estas tiom karaj, kiel al mi estis mia filo. De kiam la virinoj estas ĉe ni, mi sentas, kvazaŭ mia filo ne estus irinta sola al la longa vojo, kaj ni kune atendas ilin reveni, tiel same, kiel ili kune foriris.

Ŝi kaptis la virinojn el Kapernaum ĉebrake, kaj kun ili ŝi iradis tien-reen sur la landvojo. De la olivararboj aspergis ilin la fajna blanka polvo, kvazaŭ nubo. De malproksime alsonis el la ludanta grupo de la infanoj: „meleĥ... meleĥ! " Maria ŝovis la nigran tukon de sia griza hararo al la nuko.

– Kiel timema estis mia filo!

Unu el la vizitantinoj mallaŭte ŝin interrompis:

– Nur se li ne incitus la maljunulojn. La reĝo de judoj!

– Ne li incitis – pledis Maria por sia filo milde. – Liaj amikoj. Aĥ – ŝi longe suspiris.

La ĉarpentisto laŭte grumblis:

– Li neniam volis esti inter bonvolaj homoj. Necesis por li la pekuloj, la blasfemantoj, la uloj kun malica buŝo.

– Ne bone vi diras, ne, mia sinjoro. Mia filo estis, kiu necesis por la pekuloj, por la paganoj, por la blasfemantoj – ne tiuj necesis por li. Multfoje mi diris al li: „Mia filo, kiom nigra estas la arbaro, kaj se la suno radias sur ĝin, tamen ĝi brilas, kiel la oro, kaj kiom plenpura estas la ĉielo, kaj se venas la nokto, tamen ĝi nigras, kiel la peĉo! Ne kunestu do kun malbonaj homoj, ĉar kia estas via medio, tia aspektas vi mem ankaŭ! " Tamen mia filo alridetis min kun siaj infanecaj okuloj, kaj respondis al mi nure: „La sanaj homoj ne bezonas kuraciston, sed jes ja la malsanaj, kaj mia loko estas apud la malsanuloj." Li kredis, ke li kuracos ilin.

La ĉarpentisto amare murmuris:

– La pacientoj saniĝis, la kuracisto mortis.

La parolema virino el Kapernaum denove demandis:

– Kial vi ne sendis for vian filon por apartigi lin de liaj amikoj?

– Mi ne bezonis lin forsendi. Li mem foriris. Li kaŝvagadis en la montoj, ekis al tempestaj maroj, paŝis en arbaroj; postiris lin liaj amikoj, kiel nin postiras la ombro. Li evitis la domon de riĉuloj kaj trinkafon li petis en kabanoj malriĉulaj. Sed se li pagis al la malriĉuloj per bonaj vortoj, kaj diris, kiel diras centoj aliaj, ke la boneco de malriĉuloj fariĝos riĉeco en la transmondo: liaj amikoj jam troige asertis, ke ne troviĝas pastro en la sinedrio, kiu tiel predikus, kiel mia filo. Kiam li ŝtelesploris la sekreton de herboj kaj kuracis la suferantojn: oni distrumpetis por la reputacio, ke ne troviĝas en Jerusalemo kuracisto, kiu farus tiajn miraklojn, kiel mia filo. Se li kore favoris la samgentanojn aŭ la almozulojn kaj la kriplulojn, kaj klopodis kunigi iliajn animojn, ke ili estu kontentaj kaj fidantaj, kiel li: oni heroldis en bazaro, en preĝejo, ke eĉ imperiestro ne rilatas al la malriĉuloj tiel patrece, kiel mia filo. Kaj kiam foje-foje alvenis mia filo, li timis, ke jen implikos lin en malbonon la sanigitaj amikoj pro nura fidelo.

La ĉarpentisto ripete kapjesis:

– Ili ja implikis. Vere implikis. Nur liaj amikoj. Ili diris, ke mia filo forpelos la grandajn pastrojn, ke mia filo estas la reĝo de judoj, ke...

– Ho, Dio savu niajn idojn kontraŭ la malbonaj amikoj! – interkriis la ĝemanta virino.

Maria tiris la vizitantinojn pli preme al si. Ŝi rigardis la vojon, laŭ kiu virinoj sidis antaŭ la domoj, infanoj ludis en la herboriĉa fosaĵo, kaj viroj ŝarĝis mulojn per foiraj komercaĵoj. Ŝi aŭdis la bruon, la gajon, la vivemon. Mallaŭte ŝi ekparolis:

– Niaj filoj estas krucumitaj, tamen eĉ pasereto ne defalis de la arbobranĉo, sur kiu ĝi balancis sin, eĉ rideto ne mutiĝis, per kiu infano dolĉigis sian animon, eĉ stelo ne falis, al kiu ni direktis la rigardon, ĝin kulpigante. Nia filo mortis por ni, nur por ni. Devas esti, ke por la mondo signifas bagatelon, kio nin tiel ege doloras. Kaj eble ankaŭ nin tiom ne doloras, kiom ni kredas. Ja ankaŭ tion ni transvivis.

Mallaŭte ŝi ĝemspiris:

– Ni transvivis.

Ŝi enkondukis la vizitantinojn en la malgrandan, blankan domon, proponis al ili kukon kaj fruktovinon – ankaŭ ŝi kunmanĝis kun ili –, kaj kvazaŭ volus admoni siajn gastinojn, preskaŭ ridetante diris:

– Tamen niaj filoj estis ĉarmaj, bonaj knaboj. Por ni ĉarmaj.

La du virinoj el Kapernaum trinkis kaj kapjesis, ke tiel estas...

El la hungara: Jozefo Kiss

Du libroj por ĉiuj

Inter la multaj eldonaĵoj de Hungara Esperanto-Asocio troviĝas du libroj, kies populareco nepre superas tiun de ĉiuj aliaj. Ili estas: **Gvidlibro por supera ekzameno** kaj **Baza Literatura Krestomatio.** Ambaŭ libroj disvendiĝis jam en multaj miloj da ekzempleroj, kaj daŭre ili estas serĉataj: tiu konstanta interesiĝo pri tiuj du libroj montras, ke tre multaj esperantistoj sentas profundan bezonon ricevi konojn pri la Esperanto-Movado kaj pri la Esperanta literaturo.



Historio–literaturo–metodologio

Gvidlibro por supera ekzameno sur entute 358 paĝoj donas superrigardon pri la historio de la Esperanto-Movado (121 paĝoj), kun resumo ankaŭ pri aliaj planlingvoj. En tiu ĉi sekcio de la libro la historio de la hungara movado havas iom pli emfazitan pritrakton, ja **Gvidlibro** origine aperis por hungaraj esperantistoj; ĝia internacia populariĝo estis iom surpriza ankaŭ por la Eldonejo. Tamen, pro la sendube signifa kontribuo de la hungarlanda Esperanto-Movado al la progresigo de la Internacia Lingvo, certe ankaŭ por nehungaroj estas utile tralegi la ĉapitrojn pri la hungarlanda historio de Esperanto.

La movadhistorian ĉapitron sekvas 156-paĝa „Skizo de Esperanta literaturhistorio", kiu estas fakte la plej ĝisfunda nun disponata pritrakto de la Esperanta literaturo. Kvankam en tre konciza formo, ĝi klopodas analizi la specifajn trajtojn de la Esperanta literaturo, montrante, en kio ĝi similas al la naciaj literaturoj, kaj en kio ĝi diferencas disde ili.

La periodigo de la literaturhistorio sekvas la jam konatan skemon; unua periodo: 1887–1914; dua periodo: 1915–1945; tria periodo: 1946–ĝis la nuntempo. Kvankam la prezento de la nuntempa literaturo okupas 80 paĝojn, tamen ĉi tie la libro montriĝas la plej mankhava: ĝi ne notas la eventojn de la lastaj 6-7 jaroj, dum kiu periodo aperis tre signifaj verkoj, kaj debutis gravaj verkistoj.

La lasta sekcio estas la 50-paĝa metodiko de la instruado de Esperanto. Ĝi donas bazajn teoriajn konojn pri la instruado de lingvoj, kaj ankaŭ valorajn konsilojn al kursgvidantoj.

La libron fermas laŭnoma indekso kaj detala enhavtabelo, kiuj ebligas uzi ĝin kiel konsultlibron. Tamen, **Gvidlibro por supera ekzameno** estas unuavice studlibro, kiun devas koni ĉiu esperantisto, por kiu la Internacia Lingvo estas pli ol nura hobio.

Gvidlibro por supera ekzameno. Historio, literaturo, metodologio. Redaktis: Alfonso Pechan. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1979. Dua eldono. ISBN 963 571 031 3. 358 p. 19 cm. Prezo: 15,- ned.gld.

●●●

134 verkoj de 59 aŭtoroj...

troviĝas en Baza Literatura Krestomatio. Fakte ne ĉiuj verkoj estas kompletaj, ja estus malfacile reprodukti tutajn romanojn – el tiuj aperas nur fragmentoj.

Baza Literatura Krestomatio. (134 verkoj de 59 aŭtoroj.) Redaktis: Vilmos Benczik. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1982. Dua eldono, ampleksigita. ISBN 963 571 095 X. 276 p. 19 cm. Prezo: 13,80 ned.gld.

La ideon redakti kaj eldoni tian libron naskis la fakto, ke en la literatura sekcio de **Gvidlibro** mankas eĉ citaĵoj el la pritraktataj verkoj, do, oni povis legi *pri* la Esperantaj verkistoj, sed ne ion ajn *de* ili. La unua eldono de **Baza Literatura Krestomatio** aperis en la jaro 1979 en 3500 ekzempleroj, kaj tri jarojn poste en 1982 jam eliris nova, ampleksigita eldono en 3000 ekzempleroj. (La stoko ĉe HEA en la nuna momento estas jam nur kelkaj centoj da ekzempleroj, tial komence de 1985 sekvos nova eldono, denove ampleksigita.)

La celo de **Baza Literatura Krestomatio** estas prezenti la evoluon de la originala Esperanta beletro, kaj fakte ĝi estas unika libro sur tiu kampo. Per la elektitaj pecoj la sperta leganto povas sekvi, kiel nia literaturo evoluis ekde la komencaj tempoj ĝis niaj tagoj. Tamen, kompreneble ĝi ne servas nur spertulojn: partoprenantoj de mezgradaj kaj superaj kursoj ricevas en tiu ĉi 276-paĝa volumo la *minimumon,* kiun ĉiu klera esperantisto devas koni el la Esperanta literaturo. **Baza Literatura Krestomatio** krome estas ankaŭ elstara legaĵo, ja ĝi enhavas la plej valorajn pecojn de la originala Esperanta beletro; traleginte la specimenojn en ĝi, ĉiu povas decidi, kiuj Esperantaj verkistoj estas konvenaj por liaj gusto kaj interesiĝo. Tiamaniere **Baza Literatura Krestomatio** bone servas ankaŭ la popularigon de la originala Esperanta literaturo inter la esperantistoj.

Jen du libroj...

nemalhaveblaj por ĉiu serioza esperantisto. Ili donas fundamentajn konojn pri la ĉefaj atingoj de Esperanto. *Fundamentajn kaj nepre necesajn konojn,* ja kiel oni agadu por la disvastigo de la Internacia Lingvo sen la kono de ĝiaj ĉefaj atingaĵoj?

Dek unu pioniroj de la pacmovado

Antaŭ kelkaj monatoj aperis en Sofio 68-paĝa libro «Pioniroj kaj veteranoj de MEM», verkita de la Honora Prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado, Nikola Aleksiev. La konata aŭtoro prezentas en ĝi dek unu elstarajn esperantistajn pacbatalantojn: *Anton Balague, Semjon N. Podkaminer, Evgenij Bokarev, Tomaŝ Balda, Rudi Graetz, Gurgen Sevak, Ludoviko Márton, Otto Bässler, Petro Polišĉuk, Nguyen van Kinh kaj Konstantin Gusev.* Ĉiun prezenton akompanas foto de la prezentato, kaj ĉe la fino de la libro aldoniĝas pluaj tre valoraj fotoj pri la agado de tiuj ĉi elstaraj figuroj de la internacia Esperanto-Movado.

Tiu ĉi libro de Nikola Aleksiev bone kompletigas la historian ĉapitron de la broŝuro «MEM 30-jara», kiu aperis lastjare en Budapeŝto, okaze de la tridekjara datreveno de la fondiĝo de MEM.

Bulgara Esperantista Asocio meritas apartan dankon pro la publikigo de tiu ĉi libro, kiu cetere estos atentinda fontoverko ankaŭ por la historiistoj de la ĝenerala Esperanto-Movado.

«Pioniroj kaj veteranoj de MEM» estas akirebla pere de la landaj MEM-Sekcioj.

»POLA ESPERANTISTO« REVIVIĜAS

Dum multaj jaroj „Pola Esperantisto" estis unu el la fantomaj Esperantaj revuoj, kies titolo figuras en ĉiuj kutimaj revu-listoj, sed fakte ili aperadas tute sporade aŭ entute ne.

Antaŭ kelka tempo tiu ĉi situacio radike ŝanĝiĝis. „Pola Esperantisto" en nova formo kaj kun nova enhavo denove regule aperas, kaj iom post iom tiu ĉi kvaronjara revuo fariĝas unu el la plej interesaj pecoj de la Esperanta gazetaro.

Ĝi malmulte okupiĝas pri konkretaĵoj en la pola movado, sed dediĉas sian atenton al temoj kulturaj, esperantologiaj kaj literaturaj. Foliumante la pasintjaran jarkolekton, oni ne povas preteratenti la profunde analizan kaj diskutvekan artikolon de Jerzy Leyk: „De geo- al heliocentra sistemo", en kiu la prezidanto de Pola Esperanto Asocio esploras la internajn mekanismojn de la Esperanto-Movado.

Meritas atenton ankaŭ la artikolo „Antonimoj en Esperanto" de Slawomir Sasiadek, kvankam en kelkaj kazoj oni ne klare komprenas la logikon de la aŭtoro.

Oni povus ankoraŭ longe daŭrigi la vicon de la legindaj artikoloj, kies aŭtoroj estas plejparte poloj, tamen, ne maloftas ankaŭ kontribuaĵoj de internacie konataj verkistoj.

ORIGINALA POEZIO

Julio Varga

Papilio

Vi belis, ja inĝeniero
flugilojn planis por vi belajn,
pentristo sonĝis rave sur vin
kolorojn plezurigajn, belajn.

Somero belis. Vin kisadis
la sunradio, lulis vento,
mil florkalikoj donis al vi
mielon dolĉan kun amsento.

Sed foje la misio ĉesis:
ankor' ne falis frondo, neĝo,
vi mortis haste, ja beleco,
junec' forpasas – jen la leĝo.

Ne hontu vi pri l' turpa ido,
ne l' Nuno gravas, sed Futuro!
Disrompos ĝi la ĉerkon, fine
aperos ĝi kiel ĉarmulo.

Sekret', miraklo estas ĉiu ŝanĝo:
la belo iĝas turpa, kaj inverse,
el vivo morto, el ĝi iĝas vivo,
epokoj, rok' polviĝas kun subito,
la Vivo belas, restos poreterne.

Imre Szabó

Sur la alian ŝultron

La vojon marŝis du pilgrimantoj
malalte ŝvebis super ili
la savo

– Vidu tiun barbon blankan
kaj ĉi ostojn porozajn
ĉu krucravinojn vizaĝajn

La junulo senvortis
haltis por momento
reĝustigis sian dornokronon
sur la alian ŝultron metis
la nerabotitan lignokrucon.

Aldo de' Giorgi

Kiam denove ridi?

Kiam denove ridi mi kapablos
ne nur sardone?
Kiam ne plu turmentos noktobirdoj
agacfantome?
Kiam la primavero al mi ŝajnos
ree kolora?
Kiam la graminacĝardeno buntos
denove flora?
Kiam ĉi putran, spitan vivoŝajnon
mi ne plu trenos?
Mi scias jem delonge: kiam vi
al mi revenos!

Zora Heide

Rememoro

La masto majeste dronis en malhelo
sur marsurfaco suspiris lasta ondo
doloro svingis per via silka mano
sur ama ŝipo kiu fordrivis lante

La nokton liane volvadis doloro
surprue molaj karesoj eĥis kvazaŭ
melankolie amoras blankaj mevoj
super la ŝipo kiu fordrivis lante

Nune ĉe la marbordo regas kvieto
feliĉo ne paŝas sur varmaj sableroj
ŝipo ne dancas sur ondoj de la sceno
nur flava luno trinkas larmojn mevajn

Shi Chengtai

Medito sur Ora Monto

En parko Ora Monto ni
surgrimpis la pagodon
faman en ĉina histori'.

Ho, kontraŭ Longrivera pomp'
image konturiĝas
antikva batalkampa stomp':

La tamburbru' de Heroin'
direktis trupojn venken;
la gloro restas ĉe l' kulmin'.

Jam fumis fore la pase'...
sub la antikva ginko
babilas pri la epope'.

Edwin de Kock

Postsignoj

1

Frunte friska tuŝ'!
La momento persistis
preter la rozon.
Ho ĉarma buŝ', petaloj
de perdita sezono!

2

Post kvardek jaroj
el unu vesperiĝo
pluruĝas en vi
lilio inter loloj,
sub suno subiranta.

3

Konservis la ŝton'
de antaŭ nia mondo.
Momente sturno
eternecon ektuŝis,
re-senspuriĝante for.

PANORAMO



La Parlamentejo interne

Kunsidis la Hungara Parlamento

Meze de aprilo havis sian printempan sesion la Hungara Parlamento, la ĉefa leĝdonanta organo de la Hungara Popolrespubliko.

En tiu ĉi sesio la Parlamento starigis novan organon, kies nomo estas *Konstitucia Konsilantaro.* La nova organo – ĝia prezidanto fariĝis akademiano d-ro Rezső *Bognár* – havos la taskon kontroli la farotajn leĝojn, registarajn kaj ministrajn dekretojn el la vidpunkto de la konformeco al la konstitucio.

Alia grava rezulto de la printempa sesio estis akcepto de leĝo pri la evoluigo de la baza kaj supera instruado.

Hungaraj-italaj intertraktoj

Meze de aprilo vizitis Budapeŝton Bettino *Craxi,* ĉefministro de la Itala Respubliko. Li havis intertraktojn kun la hungaraj gvidantoj pri la rilatoj inter la du landoj, kaj ankaŭ pri la problemoj de la Eŭropa politiko. En la intertraktoj kun la hungara ĉefministro György *Lázár* havis elstaran rolon la serĉado de ebloj por ampleksigi la hungaran-italan komercon: Italio (post FRG kaj Aŭstrio) estas la tria ĉefa kapitalisma komerca partnero de Hungario. S-ro Craxi esprimis sian opinion, ke laŭ la historiaj tradicioj kaj geografia proksimeco Italio povus okupi fakte la duan lokon – tio signifas, ke ambaŭ landoj estas interesitaj en la ampleksigo de la ekonomia kunlaborado.

Pri la ĉefaj demandoj de la Eŭropa politiko la opinioj de la du landoj certagrade malsamas, sed ambaŭ registaroj estas konvinkitaj pri tio, ke la ekzistantajn problemojn oni devas solvi per intertraktoj.

Pál Losonczi kaj Bettino Craxi



PANORAMO

Nacia festo de Hungario

La plej grava nacia festo de Hungario estas la 4-a de aprilo: en la jaro 1945 tiun tagon estis liberigita la lasta hungara vilaĝo, tiun tagon la faŝistaj trupoj estis definitive elpelitaj el Hungario.

La hungara popolo ĉiujare inde festas tiun tagon, oni metas florkronon sur la monumentojn de sovetaj kaj hungaraj herooj, kiuj falis por la libereco de Hungario, kaj okazas same ankaŭ ĉe la monumentoj de alinaciaj soldatoj (usonaj, britaj ktp.), falintaj sur hungara tero en la kontraŭfaŝisma batalo. Tiu tago servas por hungaroj ankaŭ por pesi la atingaĵojn de la depost tiam forpasintaj jardekoj, kaj fiksi la novajn taskojn por la estonto.

La monumento „Libereco" sur la Gerharda Monto

Sceno el „Katoj"

«Katoj» en Budapeŝto

Jam de pluraj monatoj en la Budapeŝta Teatro „Madách" oni ludas la mondfaman muzikan komedion de Webber-Eliot: „Katoj". La spektaklo havas grandegan sukceson ĉe la publiko – malgraŭ la iom altpreza enirbileto la spektejo estas ĉiam plenplena. Ankaŭ multaj eksterlandanoj venas por vidi ĝin, precipe el Aŭstrio; la elstare surscenigita spektaklo lastatempe fariĝis unu el la ĉefaj kulturaj allogaĵoj de Budapeŝto. Venis por ĝin vidi ankaŭ la komponisto mem, kaj li estis tre kontenta pri la Budapeŝta prezentado de sia verko.

KERIPAR ofertas la idealajn vendej-meblojn por Via vendejo

La varieblaj vendejmebloj elstare taŭgas por ĉiaj vendejoj de industriaj varoj. El la varieblaj eroj en la magazenoj kaj malgrandaj vendejoj oni povas konstrui taŭgan instalaĵon kaj por memservado, kaj por tradicistila vendado.



KARAKTERIZOJ: –vasta varieblo
–granda ŝarĝebleco
–estetika aspekto

PRODUKTAS: KERIPAR Budapest VI., Népköztársaság útja 43.

Komerca Direkcio
Budapest V., Bajcsy Zs. út 72.
T: 313-124

DISVENDAS: MÜÁRT – KERIPAR Komuna Oficejo
Budapest VII., Bajcsy Zs. út 63.

EKSPORTAS: TRANSELEKTRO

REVUO DE REVUOJ

Akcele ampleksiĝas – tutmonde kaj ĉiurilate – la internaciaj kontaktoj, sed ili kunportas ankaŭ neatenditajn kontraŭdirojn, precipe en la lingva rilato. Tiun misan situacion klopodis trarigardi INTERLINGVISTIKA INFORMA SERVO (n-ro 83/4) en sia kutime racia analizo, kie – tute prave – la emfazo en la nuna fazo estas metata sur la *ne-egaleco* de la internacia lingvozuo. Nur ŝajne disvolviĝas ĉi tiuj aferoj ekster nia movado: la konkurencado de la t.n. „laborlingvoj" ĉe internaciaj forumoj, la malinklino, precipe de la junularo, lerni (ellerni!) fremdajn lingvojn, aliflanke la teknikaj veturebloj por „salti" rapide en aliajn lingvajn sferojn kaj resti tie ofte kvazaŭ surdmutulo aŭ ekstersocia ulo – por mencii nur kelkajn el la kaoson konsistigaj kontraŭdiroj – devas eksterordinare interesi nian publikon, ĉar fakte ĝi estas la plej sentema parto de la homaro tiurilate. Veki la mondan konscion kontraŭ la vaniĝinta aŭ primitiva interkomunikado, kontraŭ la stulta neglektado de la prilingva afero, neeviteble restas *destino* de nia movado, longdaŭraj spertoj instruas tion! Videblas la konduto de UNESKO, kiu estus tiurilate la plej taŭga organo... Ĵus raportis UN KAJ NI (32.) kiel la redaktoroj de „Unesko-Kuriero" prisilentas E-on en speciala numero traktanta la lingvan demandaron. Ili faras tion ne nur Eŭrop-centrisme, sed foje per bombastoj. Ŝajnas groteska (por diri milde) ekzemple tia aserto kontraŭanta interlingvon: „Lingva diverseco... estas *antaŭkondiĉo de dialogo* inter popoloj..." Nu, pri ega „sukceso" de tia dialogo inter diverslingvanoj dum certa turo-konstruado en Mezopotamio, oni legis jam raporton en tre fama antikva libro... Babela babilo malebligas la veran komunikadon – tamen la gvidaj ekspertoj de tiu internacia kultura organizo tion ne volas kompreni. La kaŭzoj certe diversas, sed inter ili estas ankaŭ tiuj, kiuj – elituloj aŭ ne – *apenaŭ renkontas E-on* okule-orele. Niaj elstaraj revuoj, konvenaj informiloj, eĉ E-eldonaĵoj devus svarme atingi iliajn oficejojn, multajn ankaŭ persone. Kial niaj fondusoj neglektas ties regulan alsendon? Ankaŭ necesas, ke eksterlande ĉiam ajn oni metu la demandojn kaj alparolojn per memkomprenebla natureco *en Esperanto*. Ni devas ja nepre venki la prisilenton de Eo kie ĝi estas kutima, kaj serioze montri la mondvastecon de nia movado, ĝiajn atingaĵojn al tiuj, kiuj *nenion konas* pri nia ekzisto.

Publikaj elpaŝoj de gravaj personoj ĝenerale forte kontribuas al nia strategio. Lerte redaktitan tekston de „Alvoko" publikigas ESPERANTO (2.). Ĝi aperis en granda sveda ĵurnalo kun titolo: *„Unu lingvo por UN?"* kiel anonco. Ĝin subskribis 76 famaj eminentuloj, ministroj, parlamentanoj, altrangaj funkciuloj k.a. Sekvis simpatiantaj programeroj en amaskomunikiloj, kiuj denove generis artikolojn kaj prelegojn pri Eo multloke: oni devas do nur celtrafe ekigi la kampanjon...

Iom longe, dum du jaroj mankis sur la lernotablo de multaj infanoj la E-a infangazeto JUNA AMIKO. Des pli plezure ni foliumas nun la reaperintan revuon (82/1. kaj 2-3.) kaj konstatas refreŝiĝintan kaj varian enhavon. La tasko, amuze eduki lingve, ne facilas por la redaktoraro, sed la komenco rajtigas esperi pri pluaj sukcesaj numeroj. Plaĉis la gajaj desegnoj kaj ŝercoj, la historietoj kaj instruaĵoj. La 5-lingva eta baza vortaro (apartigebla kiel broŝuro) bonvene daŭrigas la lertan iniciaton de la eksa redaktoro Géza *Kurucz*. Nun jam la movade tiom necesa disvastiĝo de la porinfana revuo (revuo, jes, ĉar pli ampleksa ol pluraj aliaj) dependos de la lertaj E-instruantoj kaj aktivuloj.

Mia revuado vole-nevole direktiĝis nun al la propagando, ĉar tiaj temoj vere elstaris en nia gazetaro. Iom strange, pri la temo „radio-programoj" oni legas tre malofte! Kvankam estas ege dezirinde nian publikon *instigi* por aŭskulti kaj per alskriboj *subteni* la E-disaŭdigojn. Anstataŭ sloganecaj alvokoj en gazetangulo, jen la sveda LA ESPERO (2.) inaŭguris konstantan *rubrikon* kie *Lennart Aberg*, la konata movada aganto, pritraktas la aferon de la radioaŭskultado. Kiel kapti ilin per la ricevilo, kiajn avantaĝojn ili prezentas por E-lingvanoj, por la „praktika esperantisto", eventuale program-kritikoj kaj pripensoj pri tiu agadsfero: jen abundo da temoj serioze traktataj. Aberg prave instigas la legantojn eniĝi en tiun „verdan familion", kie oni tuj sentas sin dum aŭskultado „meze de internacia medio", kie vi ricevis salutojn per la ondoj responde al viaj poŝtkartoj (tre-tre gravaj!). *Pola Radio* (ĉiutage 6-foje!) precipe meritas aŭskultantojn kaj reagojn.

Longan pripensadon de *Bernard Golden* akceptis PACO (1.) pri gramatika detaleto: ĉu uzi *per* aŭ *de*, ekz. en frazo: „domo kovrita per (de) pajlo? " La filologie bone strukturita artikolo ĉirkaŭiras multajn ekzemplojn de gravaj aŭtoroj, eĉ la konsilojn donitajn al la verkantoj iam kaj nun. Mian atenton pleje kaptis la fina maltrankviliĝo de la multmerita Golden, ĉar „malfacila ŝajnas *formuli regulon*"! Regulojn donu al ni, Senkorpa Mistero! – sonas ofte de reguligemuloj. (Kiam skribi „mia infano" kaj kiam „mia filo"? – aŭdiĝis iam kanto de verkanto pri nesufiĉeco de reguloj...) Kvankam el liaj 70 citaĵoj jam evidentiĝis la respondo, kiun *Violin Oljanov* konkludis postskribe, ke simple la percepto de la aŭtoro aŭ parolanto decidas, laŭ kio li konsideras la „pajlon sur la domo"! Sed prefere, ni ne draŝu pajlon!

Ervin *Fenyvesi*

Szilárd Bálint

La kukolido

En komerca entrepreno laboris Eva kiel oficistino kaj tie laboris – la estimata leganto jam certe divenis – inter aliaj iu junulo, kiun ni nomu en nia novelo Johano. Nenio interesa okazis inter ili ĝis la komenco de nia historieto, kvankam Johano kelkfoje jam rimarkis, kvazaŭ la iom pli aĝa virino observeme rigardus lin el la alia angulo. Diable – li pensis –, mia ruĝa hararo igas la virinojn stulte admiri mian ruĝecon, tamen poste ili montras dorson al mi! Kiel ofte mi jam trompiĝis...!

Tamen okazis, iam, ke post la laborhoroj ĉe la tramhaltejo Eva alparolis nian heroon:

– Ĉu vi havas eventuale ĉi-vespere liberan tempon?

– Nature... sed kial, fraŭlino Eva?

– Mi diras al vi grandan konfeson! Aŭskultu: mi iĝis hodiaŭ 40-jara! Kaj en tiu urbeto mi havas nek parencojn, nek geamikojn. Ĉu vi jam divenas? Mi preferas kunsoleni mian naskiĝtagon kun vera viro.

– Do kun mi? Grandioze... sed proksime la kafejo, ni iru tien!

Trinkante konjakon, la glasoj sonis ĉin-ĉin, tin-tin, kaj Eva, profunde rigardante en la virajn okulojn, ekparolis:

– Mi vidas, ke vin surprizis mia iniciato. Ĉu vi malsimpatias?

– Tute male, kara Eva! Sed oni scias en la kontoro, ke vi estas tre retenema, do mi ne alproksimiĝis... Sed nun decus donaci al vi ion belan je via naskiĝtago – diris Johano kaj ekpremis la malvarman, tremantan manon de Eva. Virina kareso estis la respondo.

– Kara Johano, neniom pensu pri donaco. Male, mi volas doni al vi ion... sed ne tie ĉi... Ĉu eblas tion priparoli en via loĝejo?

– Ho, mia kara, tion mi devus jam proponi al vi! Sed mi ne kuraĝis...

– Do... ni ekiru tuj, ĉu bone? – ŝi ridetis loge kaj ekpremis la manon de Johano.

La enĉambra interparolado iĝis baldaŭ voluptoplena, kaj la estimata leganto povas imagi, ke la mebloj necesaj por ŝanĝi la vortojn je agoj ne mankis el la ĉambro de la junulo. Sekve ne mankis kisoj kaj karesoj; vestaĵoj flugis disen, brakoj kaj aliaj korperoj interplektiĝis pli kaj pli pasie. La postajn amplenajn horojn de la nokto jam pluraj klasikaj poemoj kaj romanoj artplene rakontis; tial estus tute superflue ree rakonti tion, kion oni povas abunde legi en ĉiu bona publika biblioteko (escepte de teknikaj bibliotekoj).

La pasia kaj praktikata amo(ro) inter ili daŭris monatolonge... Estis foje bela tago (tamen eblas ke pluvis, ŝajnis poste al Johano). Eva tagmeze vokis lin en la fono de l' koridoro, for de la kolegoj, kaj flustris al li:

– Kara mia! Sciu, ke morgaŭ mi edziniĝos...

– Kiel do? – miris tutbuŝe Johano. – Kaj al kiu?

– Jes, akceptu tion, ĉar mi estos la edzino de pli aĝa inĝeniero. Li havas hereditan domon, aĉetitan aŭton kaj volas havi ankaŭ infanon. Nu, lia sopiro realiĝos... ĉar mi jam estas graveda de vi.

– Sed nia bela amo? Tiel abrupte... kaj kun aliulo?

– Amo estas ja nura iluzio, kredu al mi, Johano! Ekzistas la biologia devo interhoma, la reprodukto... Vi scias, ke dudek-jaruloj kun granda amo geedziĝas, sed poste disreviĝas kaj divorcas. Tial mi ne emis havi ĝis nun laŭleĝan ligon.

– De kie troviĝis tiu viro nun por vi?

– Antaŭ deko da jaroj ni ege amis unu la alian... sed li turnis sin alien, edziĝis al iu, kiu forlasis lin post kelkaj jaroj, ĉar ŝi ne volis naski infanon.

Post la preskaŭ sekrete okazinta geedziĝo Johano kelkfoje eksperimentis inviti Evan por denove kunesti en lia loĝejo, sed sensukcese...

Post semajnoj Eva kaj Johano devis veturi al fora urbo por komercaj traktadoj. En la hotelo troviĝis nur dulitaj ĉambroj, kaj neniu miros, ke Johano proponis „ŝpari monon" – per komuna ĉambro. Eva tamen rifuzis lian afablecon, aludante al la ĵaluzo de la edzo. Kaj ŝi pravis, bonŝance, ĉar frumatene alvenis la edzo per aŭto, kaj trovis la edzineton ne en komuna ejo, sed aparte. Li kondutis ĝentile, kaj la triopo manĝis kune en restoracio. Post la traktadoj la edzo invitis Johanon kune hejmen vojaĝi en lia aŭto. Tamen hejme li demandis la edzinon: de kie venis tiu ruĝa viro al la laborejo?

– La sorto ĵetis lin en nian entreprenon... – sonis la dubsenca respondo de Eva.

Post paso de monatoj Eva naskis ĉarman filon. Sed kiam la ĝojplena edzo vizitis ilin en la hospitalo, li devis rimarki ankaŭ ion surprizan: la bebo havis belajn ruĝajn harojn... Nenion li diris, estante vere ĝentila edzo, tamen surkoridore li demandis la flegistinon:

– Kiel eblas, ke nia fileto iĝis ruĝhara?

– Nu, eble, verŝajne – ŝi hezitis –, via kara edzino tro admiris dum la gravedo iun ruĝan viron...

La edzo longe meditis kun diversaj duboj. Fine li petis medicinan sangekzamenon, kies rezulto pruvis, ke lia patreco estas ekskludebla. La kokrita inĝeniero intencis eksedziĝi – kvankam la tiom dezirata fileto vere plačis al li. Eva turnis sin al alia fakulo: tiu science konstatis, ke ĉe la inĝeniero mankas – la kapablo generi.

* * *

Kara Leganto! La redakcio ne konas, kion decidis finfine la geedzoj. Tial ni petas vian helpon. La plej bona solvo ricevos libropremion kaj la teksto aperos en Hungara Vivo. Limdato: 2 monatoj post la apero de la historio.

Daŭrigo de la novelo «Kion diras la dekalogo?»

aperinta en la n-ro 1983/3.
Daŭrigas: Mia Kremer, el Wijdewarmer (Nederlando)

Post longa tempo la telefono ektintis: „Ĉu Vi volas senprokraste veni al la Centra Hospitalo? Via patrino ekhavis koratakon en la flugmaŝino..." La informantino nur pene eligis la vortojn iom hezitante: „Ĉu ŝia farto? Tre-tre malbona... ŝi estas mortanta..."

x—x

La patrino rekonsciiĝis: kie ŝi troviĝas? Tio estas ja hospitalo! Sub si ŝi rimarkis liton kun virino, evidente mortanta, dio mia! ... Sed tiu virino, kuŝanta tie – ne povas esti vera! – estas ŝi mem!

Kaj unuflanke de la lito sidis Olga kaj Agnesa ploretantaj, aliflanke staras seriozmiena flegistino. La patrino vidis kaj aŭdis ĉion, sed ne povis ekparoli. Ŝi aŭdis, ke Olga flustras: Ĉu mortis? La flegistino kapneis: – Ankoraŭ ne, sed ne daŭros longe. Tiam Agnesa ekploris pli laŭte: – Kiel mi hontas! Ŝian monon ni ricevos, sed tiupreze! Kial ni incitis ŝin kontraŭ la Egiptia vojaĝo? Olga plorsingultis: – Prefere mi ricevus nenion, nur ŝin viva! Kial ni ne pli amis ŝin? !

Granda ĝojo plenigis la koron de la patrino. Kaj ŝi ekflustris al la filinoj: – Miaj Olga, Agnesa, ne ploru, ĉar mi ne mortas. Kaj mi pardonas tutkore ĉion... Sed la filinoj aŭdis nenion. Kaj ŝi brakumis Olgan, poste Agnesan... Sed la filinoj rimarkis nenion... La flegistino mallaŭte diris: – Via patrino estas mortinta.

Jus aperis!

D-ro Endre Dudich: Ĉu vi konas la Teron? Populariga libro pri geologio, originale verkita en Esperanto. Eldonis: Scienca Eldona Centro de Universala Esperanto-Asocio, Budapest. 1984. 150+64 p. 24 cm., ilustrita. ISBN 963 571 080 1.



Tero estas nia komuna lulilo, hejmo, sed – ĉu ni konas ĝin sufiĉe? Certe ne! Por pli bone ekkoni ĝin donas eblon tiu ĉi nova libro, en kiu kombiniĝas elstara faka kompetenteco kaj kvazaŭ aventurromane interesa priverko.
Esperantistoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetio povas mendi ĝin kiel aliajn eldonaĵojn de Hungara Esperanto-Asocio; el aliaj landoj oni sendu sian mendon al la Libroservo de UEA.

Jus aperis!



Julian Modest: La Ora Pozidono. Romaneto, originale verkita en Esperanto. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1984. 68 p. 21 cm. ISBN 963 571 132 8
Prezo: 8,10 ned.gld.

Post la sukcesa dramo *Ni vivos!* , Julian Modest aperas antaŭ la publiko kun romaneto, kies agado disvolviĝas dum feriaj tagoj sur la bulgara marbordo, kaj ĝi penetras en la misterojn de la plej nedifinebla homa sento – la amo.
La nostalgie-melankolia historio, la konturitaj personaĵoj kaj la simpla, sed ĉiam trafa lingvaĵo promesas por ĉiu aĉetanto agrablajn leghorojn.
La libron mendu ĉe Hungara Esperanto-Asocio aŭ ĉe via kutima libroservo.

Jus aperis!



Henrik Seppik: La tuta Esperanto. Dua eldono. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1984. 181 p. 21 cm. ISBN 963 571 127 X
Prezo: 15,- ned.gld.

La unua eldono de tiu ĉi verko aperis en 1938 ĉe la eldonejo Literatura Mondo, kaj merite ĝi rikoltis grandan sukceson. Seppik tre lerte kombinas en sia verko la trajtojn de sistema gramatiko kaj progresiga kurslibro: la praktika uzanto povas trovi en ĝi per ekzemploj ilustritan klarigon por ĉiu sia gramatika dilemo.
La libron mendu ĉe Hungara Esperanto-Asocio aŭ ĉe via kutima libroservo.

Ferenc Köves
dipl. inĝ. **pri metalurgio**
esplor-inĝeniero de
Csepel Fabrikoj, Ferfabriko

Disvolvo de ŝtaltubo-produktaĵoj por la naftoindustrio, kaj ties rezultoj

La fabrikado de senjuntaj ŝtaltuboj komenciĝis en la jaro 1920 en Csepel sur la nova t.n. Malgranda maŝinserio Pilger (pilgrima). En la postaj jaroj aldoniĝis tri Pilger-serioj kaj du ŝovbenkoj, per kiuj la produkto de laminado altiĝis jare ĝis 185 kilotunoj en 1953.

La Usona Petrol-Instituto (API) ekde 1921 normigis la bortubojn uzatajn en la nafto-industrio, nome la ŝlimtubojn, pumptubojn kaj bortubojn, krome ankaŭ la oleoduktojn.

En Csepel oni jam ekde 1923 fabrikis ŝlimtubojn por rotacie kaj frape movata profundborado. Post 1935 kontinue ampleksiĝis la produktado de la ŝlimtuboj, pumptuboj kaj bortuboj, ankaŭ oleoduktoj por la rotacia profundborado laŭ API-normoj. La nuntempa produkto estas jam jare 21 kt el ŝlimtuboj kaj pumptuboj de grado J55 laŭ API Spec 5A, kaj el duktoj laŭ MSZ (hungara normo). La fabriko rajtas uzi la monogramon API depost 1958 por la ŝlimtuboj, pumptuboj kaj bortuboj laŭ Spec 5A, por la duktoj laŭ Spec 5L, krome por la helicoj laŭ Spec 5B.

Koncerne la fabrikadon de nafto-industriaj ŝtaltuboj grave kontribuis la bortubo-uzino, kreita en 1950, la tub-helic-tranĉatorparo Cri-Dan, ekuzita de 1963, kaj la pretigaj-prilaboraj instalaĵoj, investitaj en 1979-82, krome la kaldron-metalurgia procezo, enkondukita en 1982.

La novaj maŝinoj instalitaj dum la moderniga investado plibonigis unuavice la kvaliton kaj produktivon de la nafto-industriaj ŝtaltuboj:

– la tubfinon ŝveliga premilo (Mannesmann – Demag) plipreciz̃igas la kalibrigon de tubfinoj, ebligas fabriki bortubojn, krome finŝveligon de pumptuboj per premilo, anstataŭ pilgeran findikigon,

– la mufdispecigaj kaj helictranĉaj maŝinoj (Cri-Dan) plibonigas la mezurprecizecon kaj la surfacan glatecon,

– la muf-galvanizatoro Schlötter kovras per kontinua kaj adhera tavolo,

– la mufvolvatoro Restellnini ebligas momantvolvadon laŭ la preskriboj,

– per la tub-mezura kaj -signa aparato oni faras ĝustan mezuradon pri longo kaj pezo, bonaspektajn signadon kaj enpreson, ricevante ankaŭ aŭtentikajn registraĵojn.

La kaldron-metalurgia procezo ebligas ĉe la fabrikado de nafto-industriaj ŝtaltuboj disvolvi multe pli modernajn ŝtalvaro-familiojn. La kompletigo de la Siemens–Martin ŝtalfabrika procedo per polvoblova kaldron-metalurgia unuo grave malpliigas la oksigen- kaj sulfur-enhavon de la fluida ŝtalo, ankaŭ ĝiajn veziketojn, do favore modifas ĝin, ebligas krome ekonomian mikroalojadon.

Tamen la supraj investadoj kaj la kaldron-metalurgia procezo ne modernigas signife la produktaĵ-gamon de naftoindustriaj ŝtaltuboj, ĉar la investojn ne sekvas paralele la konstruado de la nova tubfabriko.

Por modernigi la produktaĵ-gamon oni devas do preferi tiujn disvolvojn de la produktaĵoj, kiuj ne bezonas gravajn investadojn. La celo estas fabriki pli uzeblajn, sur la merkato pli postulatajn ŝtaltubojn por la nafto-industrio, tiamaniere laŭeble anstataŭigi importon kaj pliigi eksporton.

Dum tiu disvolvo de la produktaĵoj oni devas aparte okupiĝi koncerne la ŝlimtubojn, pumptubojn kaj bortubojn. Tiucele oni devas ekzameni

– la karakterizojn de la tubo-aplikadoj,

– la postulojn de la API-normoj pri la materialkvalito, mezur-precizeco kaj helic-tranĉo de la tuboj,

– la plenumeblon de tiuj postuloj en la ŝtalfabrikado, tubo-fabrikado, helic-tranĉado kaj kontrolado.

a.) La karakterizoj de la tubo-aplikadoj

– La tasko de la bortuboj estas energio-transportado (rotacia kaj hidraŭla) sur la fundon. La bortubojn ŝarĝas la propra pezo, la torda momanto, la fleksiĝo kaj la interna superpremo.

– La tasko de la ŝlimtuboj estas la ekstera kovro de la puto (bortruo). Tiujn tubojn ŝarĝas

la propra pezo, la interna kaj ekstera superpremoj.

– La tasko de la pumptuboj estas la elterigo de la nafto el la puto. Ĉi-tiujn ŝarĝas la propra pezo kaj la interna superpremo.

b.) La postuloj de la API-normoj pri la materialkvalito, mezur-precizeco kaj helic-tranĉo de la tuboj

– La postuloj pri la material-kvalito koncernas la mekanikajn proprecojn kaj la kemian konsiston. Tiujn prezentas la tabeloj 1. kaj 2. Laŭ la profundiĝo de la borado oni devas pliigi la tirreziston de la ŝtalo, sed samtempe zorgi pri ĝia necesa firmeco. Ties rimedoj estas la malpliigo de la vezikoj, enfermaĵoj kaj la mikroalojado, krome la termomanipulado. En la kemia konsisto

Tabelo 1.

API-preskriboj pri la mekanikaj ecoj de ŝlimtuboj, pumptuboj kaj bortuboj

Speco	Fluideclimo min. N/mm^2	maks. N/mm^2	Tirrezisto min. N/mm^2	Etendo min. A_2 %
Normalaj kaj plirezistaj gradoj laŭ API Spec 5A				
J55 ŝlimtubo, pumptubo	379	553	517	24–15,5
K55 ŝlimtubo	379	552	665	19,5–12,5
N80 ŝlimtubo, pumptubo	552	758	689	18,5–12,0
D* bortubo	379		665	19,5–12,5
E bortubo	517	724	689	18,5–12,0
Grado kun fluideclimoj malpliigitaj laŭ API Spec 5AC				
C-75 ŝlimtubo, pumptubo	517	620	665	19,5–12,5
L-80 ŝlimtubo, pumptubo	552	665	665	19,5–12,5
C-95 ŝlimtubo	665	758	724	18,0–11,5
Altrezista grado laŭ API Spec 5AX				
P-105 pumptubo	724	931	828	16–11,5
P-110 ŝlimtubo	758	965	862	15–11,0
X-95 bortubo	655	862	724	18–13,0
G-105 bortubo	724	931	793	16,5–12,0
G-135 bortubo	931	1138	1000	13,5–9,5

* Forigita de API en 1981 (en la hungara normo validas).

Tabelo 2.

API-preskriboj pri la kemia konsisto de ŝlimtuboj, pumptuboj kaj bortuboj

Normala kaj plirezista gradoj laŭ API Spec 5A, kaj altrezista grado laŭ API Spec 5AX:

$P_{maks.}$ = 0,04% $S_{maks.}$ = 0,06%, krome

gradoj kun fluideclimoj malpliigitaj laŭ API Spec 5AC:

		C		Mn		Mo		Cr		Ni	Cu	S	S	Si
Speco	tipo	min.	maks.	min.	maks.	min.	maks.	min.	maks.	maks.	maks.	maks.	maks.	maks.
C-75 ŝlimtubo pumptubo	1	...	0,50	...	1,90	0,15	0,40	*	*	*	*	0,040	0,060	0,35
C-75 ŝlimtubo pumptubo	2	...	0,40	...	1,50	...	...	...	...	...	...	0,040	0,060	0,35
C-75 ŝlimtubo pumptubo	3	0,38	0,48	0,75	1,00	0,15	0,25	0,80	1,10	...	...	0,040	0,040	0,35
L-80 ŝlimtubo pumptubo	...	...	0,40	...	1,90	...	...	...	...	0,25	0,35	0,040	0,060	0,35
C-95 ŝlimtubo	...	...	0,45	...	1,90	...	...	...	...	...		0,040	0,060	0,35

* La suma valoro de Cr, Ni kaj Cu devas ne esti pli ol 0,50%.

la API Spec 5A kaj 5AX limigis nur la fosforon kaj sulfuron, sed la API Spec 5AC preskribas jam plurajn elementojn por la tuboj korodotaj de hidro-sulfidoj.

Por la termomanipulado oni devas – laŭ la API Spec 5A – laŭnormigi la ŝlimtubojn de gradoj J55, K55 kaj N80, ankaŭ la pumptubojn de grado J55. Se la aĉetanto deziras, oni devas tutlonge termomanipuli la pumptubon de grado N80 kaj la bortubon de grado E post ŝveligo. Laŭ la API Spec 5AC kaj 5AX oni devas ĉiujn gradojn termomanipuli, per laŭnormigo kaj malhardado, aŭ per hardado kaj malhardado.

– La postuloj pri la mezur-precizeco koncernas la tolerojn ĉe diametroj, vandodíkoj kaj specifaj pezoj, krome la longecgrupojn. Tiujn prezentas la tabelo 3.

– La postuloj pri la helic-tranĉo koncernas la reliefojn, dimensiojn kaj tolerojn, krome la helic-faradon sur la mufoj. Tiuj troviĝas en la API Spec 5B normo.

Tabelo 3.

Preskriboj laŭ API Spec 5A, 5AC, 5AX por ŝlimtuboj, pumptuboj kaj bortuboj

Toleroj		*Longogrupoj*			
por ekstera diametro:			Range 1	Range 2	Range 3
4" kaj maplia 0 :	±0,79 mm	*Tuta longo:*			
4 1/2 " kaj plia 0 :	±0,75 %	Casing	4,88–7,62	7,62–10,36	10,36–14,63
por vandodiko:	±12,5%	Tubing	6,10–7,32	8,53–9,75	––
por pezo:		Drill Pipe	5,49–6,71	8,23–9,14	11,58–13,72
opaj tuboj:	± 6,5%				
	–3,5%				
vagonliverajoj:	–1,75%				

c.) La plenumeblo de la postuloj en la ŝtalfabrikado, tubofabrikado, helic-tranĉado kaj kontrolado

– En la ŝtalfabrikado la kondiĉoj ekzistas por malpliigi la veziketojn kaj por la mikroalojado, parte ĉe la elektrofornoj, parte ĉe la Siemens-Martin-fornoj, aplikante la kaldron-metalurgian procezon.

– En la tubofabrikado la kondiĉoj por la mezur-precizeco kaj termomanipulado ne sufiĉas, pro mankoj de konvena mezuranta cilindroparo kaj portuba termomanipulatoro.

– Ĉe la helic-tranĉado kaj la tuboj, kaj la mufoj estas konvene prepareblaj.

– Ĉe la kontrolado la kondiĉoj ekzistas koncerne la tubojn kaj la mufojn; tamen la ŝtopado kaj la sendifekta ekzamenado okazas per malmodernaj metodoj kaj ne produktive.

Laŭ la ekzamenadoj kaj analizoj ni preparis la programon por la produktaĵ-disvolvo de la nafto-industriaj ŝtaltuboj. La plej gravaj celoj kaj la atingitaj rezultoj de la programo estas la sekvaj:

1.) La modernigo de la kvalito de la ŝlimtubo de gradoj J55 kaj K55, kaj la pliampleksigo de ties fabrikado

Anstataŭ la ŝtalkvalito laŭ la kutima granda enhavo de karbono kaj mangano, ni kreis, surbaze de niaj eksperimentoj, ŝtalkvaliton manipulitan per kaldron-metalurgio, kun malgranda karbon- kaj manganenhavo, mikroalojitan kun boro kaj vanadio. Ĝiaj kemia konsisto kaj mekanikaj ecoj kontentigas la preskribojn de la grado J55; sam-

tempe la plej altnivelaj de tiu ŝtalo konvenas ankaŭ al la grado K55.

La nova ŝtalkvalito havas pli favorajn mekanikajn ecojn laŭlonge kaj transverse, plibonigas la veldeblecon kaj la korodimunecon precipe kontraŭ hidrosulfato.

La fabrikadon de tiu ĉi nova ŝtalkvalito ni komencis dum la dua duono de la jaro 1983.

La kvaliton de la ŝlimtuboj plibonigas ankaŭ tiuj instalaĵoj, kiujn ni ekfunckiigis dum la moderniga investado.

Por enlanda utiligo en 1983 ni fabrikis 19 kilotunojn, kio en 1980 restis nur 13 kt. En 1984 ni fabrikos 20 kt; tio tute kontentigos la enlandajn bezonojn.

Ankaŭ al kapitalismaj landoj ni liveris 800 tunojn en la jaro 1983, sed en la jaro 1984 jam 1000 tunojn.

2.) Enkonduko de la ŝlimtubo-fabrikado de grado N80

Dum fabrikado de la ŝlimtuboj de grado N80 la kutima teknologio aplikas ŝtalkvaliton de mangan-molibden-alojo kaj termomanipuladon. Manke de konvena termomanipulatoro tiun ĉi gradon pli frue ni ne produktis.

Surbaze de niaj esploroj ni kreis ŝtalkvaliton manipulitan per kaldronmetalurgio, kun malgranda karbonenhavo, mikroalojitan kun vanadio kaj nitrogeno.

Tiu ŝtalkvalito per strukturreguliga laminado, sen termomanipulado ebligas fabrikadon de la ŝlimtuboj de grado N80, kiu havas altan fluideclimon kaj altan specifan frapeblon. La strukturreguligan laminadon ni plenumas, krom la kutimaj lamina tempo kaj malvarmiĝa rapideco, ĉe malpli alta laminadon-fina temperaturo.

Per la nova procezo ni akiras fajn-grajnan teksturon kun granda ferito- kaj eta perlito-konsisto. La postulatajn mekanikajn ecojn tiu ŝtalo prezentas per granda certeco, krome kun favora korodimuneco.

La mekanikajn ecojn de la eksperimentaj ŝlimtuboj de grado N80 kun diametro 7", prezentas la tabelo 4, kaze de laminadon-finaj alta kaj malalta temperaturoj. Fig. 1. montras bildon de teksturo de la tubo finlaminita ĉe alta temperaturo; fig. 2. montras la bildon de la tuba teksturo, kiu estis laminita ĉe malalta temperaturo. Ambaŭ teksturoj estas ferit-perlitaj, tamen en kazo de finlaminado ĉe malalta temperaturo la grandeco de la grajnoj iĝis pli fajnaj.

La fabrikadon de la ŝlimtuboj de grado N80 ni komencis en la unua duono de la jaro 1983.

Por enlanda utiligo en 1983 ni fabrikis 180 tunojn, dum 1984 ni fabrikos 1300 t, kiu kvanto kreskos en 1986 je 3000 t, kaj per tiu ni tute kontentigos la enlandajn bezonojn.

Tabelo 4.

Mekanikaj proprecoj de 7" diametra ŝlimtubo de grado N80

Vandodiko		8,05 mm						11,51 mm					
		ReH N/mm²	Rm N/mm²	A2" %		KCV J/cm²		ReH N/mm²	Rm N/mm²	A2" %		KCV J/cm²	
Laminadon fina malalta temperaturo	P	683	796	22,0	75	73	74	655	804	20,5	171	211	189
	R	689	818	21,6	75	73	73	640	796	20,5	103	86	177
Laminadon fina alta temperaturo	P	676	821	25,6	48	64	66	605	791	29,6	60	48	123
	R	664	824	24,4	27	34	23	613	764	17,2	26	33	36

P = tubfino ĉe pilgerkapo
R = tubfino ĉe rompita flanko



Figuro 1

Figuro 2



3.) Modernigo de la kvalito de la pumptubo de grado J55, kaj la pliampleksigo de ĝia fabrikado

Disde la tradicia fin-dikiĝo per pilgerlaminado, ni transiris al la finŝveligo per la nova tubfinonŝveliga premilo. La kvalito de la pumptubaj finoj tre grave pliboniĝas per tiu ĉi nova metodo.

La fabrikadon per tiu moderna kaj nova procezo ni enkondukis en la unua duono de la jaro 1983.

La kvaliton de la pumptuboj plibonigas ankaŭ la ceteraj instalaĵoj, kiuj estis ekfunkciigitaj dum la moderniga investado.

La kutiman ŝtalkvaliton ni ŝanĝas sammaniere kiel menciite en la punkto 1.) pri la ŝlimtuboj de gradoj J55 kaj K55. La provfabrikadon de la pumptuboj per tiu ŝtalkvalito ni komencas en la unua duono de tiu ĉi jaro, 1984. Nia celo estas plibonigi per tiu nova ŝtalkvalito la ecojn de la pumptuboj, unuavice la korodimunecon.

Por enlanda utiligo ni fabrikis en la jaro 1983 entute 1600 tunojn. En la jaro 1984 ni fabrikos 2100 tunojn, en 1986 jam 3000 tunojn, kaj tiel ni plene kontentigos la enlandajn bezonojn.

4.) Eksperimenta fabrikado de la pumptubo de grado N80

Koncerne la disvolvadon de la pumptubo de grado

N80, en la jaro 1984, almenaŭ en la dua duonjaro, ni volas plenumi la eksperimentan fabrikadon per la sama procezo, kiun ni supre skizis en la punkto 2.), uzata por la ŝlimtubo de grado N80. Do ni fabrikos ĝin el kaldron-metalurgie manipulita kaj mikroalojita ŝtalkvalito, per strukturreguliga laminado.

5.) Enkonduko de bortubo-fabrikado de gradoj D, E kaj G

La teknologio por fabriki la bortubojn de grado D, E kaj G kutime estas la uzo de diverse alojita ŝtalkvalito, finŝveligo per la tubfinon-ŝveliga premilo, krome termomanipulado ĉe la gradoj E kaj G. Manke de la tubfinon-ŝveliga premilo, ni pli frue fabrikis tiujn bortubojn.

Pere de ekfunkciigo de la nova tubfinon-ŝveliga premilo iĝis jam ebla la ekstera, interna kaj la ekstera-interna ŝveligo de la bortub-finoj.

Surbaze de niaj esploroj, ni kreis ŝtalkvaliton, manipulitan per kaldron-metalurgio, kaj mikroalojitan kun vanadio.

Tiu ĉi ŝtalkvalito prezentas kun granda certeco la preskribitajn mekanikajn ecojn de la bortuboj; ĉe la grado D sen termomanipulado, ĉe la grado E per laŭnormigo aŭ malhardado, kaj per fajnigo ĉe la grado G.

Por fabriki bortubojn kun diametro 3 1/2", ni eksperimentis provpecojn kun termomanipulado. La tabelo 5. prezentas la mekanikajn ecojn de la eksperimentitaj provpecoj per diversaj kvalitoj kaj termomanipuladoj. Figuro 3. montras bildon de la teksturo de la laŭnormigita bortubo de grado E; figuro 4. montras la teksturon de fajnigita bortubo de grado G. La laŭnormita teksturo estas ferit-perlita, la fajnigita teksturo estas malhardita-martenzita.

Tabelo 5.

Mekanikaj ecoj de 3 1/2" diametra bortubo

Kvalito	Termomanipulado	R_{eH}	R_m	$A_{2"}$	KCV
		N/mm²	N/mm²	%	J/cm²
–	laminita	677	869	18,7	31
E	normalizita	544	705	22,8	141
E	fajnigita	631	755	18,6	166
G	fajnigita	758	826	17,0	136



Figuro 3

Figuro 4

Pro manko de konvena termomanipulatoro ni povas produkti nur la gradojn D kaj E. Fabrikadon de la grado G ni intencas realigi pere de eksterlanda kunlaboro.

La eksperimentajn fabrikadojn de la bortuboj de grado D kaj E ni finis en la jaro 1983. Dume ni prove liveris jam al kelkaj uzantoj specimenojn. La efektivan fabrikadon ni komencas en la jaro 1984, unuavice por enlanda utiligo.

Nuntempe oni preparas modernigi la hungaran normon pri la bortuboj de grado D kaj E.

Daŭras jam traktadoj koncerne la fabrikadon de bortuboj pere de eksterlanda kunlaboro. Ankaŭ provliveroj jam okazis tiurilate. La efektivan fabrikadon ni komencos antaŭvideble dum la jaro 1984. En la kadro de tiu kunlaboro ni pleje liveros al kapitalismaj landoj, tamen ni intencos kontentigi ankaŭ enlandajn bezonojn.

6.) Enkonduko de fabrikado de altrezistaj duktoj

Laŭ la kutima teknologio por fabriki altrezistajn duktojn oni uzas termomanipulatoron. Pro manko de konvena instalaĵo por la termomanipulado pli frue ni ne fabrikis tiujn tubojn.

Surbaze de niaj esploroj ni kreis altrezistan dukto-familion de kvalito WTX. Tiuj tuboj estas fabrikataj el mikroalojita ŝtalo kun eta karbonenhavo, per kaldron-metalurgio kaj strukturreguliga laminado, sen termomanipulado.

La duktojn de kvalito WTX karakterizas altaj fluideclimo kaj tirrezisto, granda etendo, malalta provizora temperaturo, krome bona veldeblo kaj korodimuneco kontraŭ hidrosulfidoj. Tiuj tuboj estas produktataj laŭ ses gradoj. La mekanikaj ecoj konvenas al la preskriboj pri konduktuboj en API Spec 5L/1983 (koncentrigo de la antaŭaj

5L, 5SL kaj 5LX), ankaŭ al la preskriboj en DIN 17172/81 pri longdistancaj duktoj, kontentigas ankaŭ la postulojn pri la malvarma frapkapablo laŭ hungara normo MSZ 13802/1-79.

Surbaze de la mekanikaj ecoj de divers-diametraj eksperimentaj konduktuboj de gradoj WTX 50 kaj WTX 70, ni preparis preskribojn pri la mekanikaj ecoj de la duktoj de kvalito WTX, laŭ la tabelo 6.

Pro la elstaraj proprecoj de la duktoj de kvalito WTX – kompare al la duktoj de kvalito 52 K, kiuj estas ĝenerale uzataj kiel konduktubo – la WTX duktoj ebligas grave malpliigi la vandodikon. Ili plene kontentigas la postulojn pri la modernaj ŝtalvaroj.

La fabrikadon de la duktoj de kvalito WTX ni komencis en la dua duono de la jaro 1983.

Tabelo 6.

Preskriboj pri mekanikaj ecoj de duktoj de kvalito WTX

Grado de	R_{eH} x	R_m		Etendo	KV+20 °C xx
	min.	min.	maks.	min.	min.
kvalito	N/mm²	N/mm²	N/mm²	%	J.
WTX 45	320	460	580	23	80
WTX 50	360	510	630	20	60
WTX 55	385	530	680	19	60
WTX 60	415	550	700	18	60
WTX 65	445	560	710	18	50
WTX 70	480	600	750	18	50

x Se R_{eH} atingas la malsupran valoron de R_m, tiam R_{eH}/R_m ĉe WTX 45-55 estu min. 0,85, ĉe WTX 60-70 min. 0,90!

xx La valoro de fraplaboro je 0, -20 kaj -40 C gradoj estu ĉe ĉiuj kvalitgradoj min. 47 J!

Por enlanda utiligo ni fabrikis en la jaro 1983 entute 190 tunojn; en la jaro 1984 ni fabrikos jam 4000 tunojn.

Oni jam preparas la hungaran normon pri la duktoj de kvalito WTX.

7.) La pilgermaŝinaroj, produktantaj la nafto-industriajn tubojn, laminadas la tubojn ĝispretaj. Pro tio ne eblas plenumi tute certe la preskribojn pri mezurprecizeco

Dum la disvolvado de la senjunta tubfabrikado ni intencas enkonduki mezur-laminadon ĉe la nafto-industriaj tuboj, por pliigi la mezurprecizecon.

Ĝis ties investado ni volas plibonigi la mezurprecizecon per modernigo de la pilgermaŝinaro kaj teknologio. Unuavice ni intencas plian sinkronigon de la pilgercilindro kaj la antaŭenŝovilo, krome modernigi la antaŭenŝovilon.

8.) La helico de la ŝlimtuboj kaj pumptuboj produktatas per rondigo de la t.n. ŝnurhelico-tranĉado

Dum la disvolvo de la fabrikaĵoj ni planas enkonduki la helic-tranĉadon Buttross kaj la gas-imunan helic-tranĉon. Niaj instalaĵoj kapablas tiel fabriki. Por la gas-imuna helic-tranĉado ni intencas aĉeti patenton el eksterlando.

Resumo

Konstateblas, ke dum la lastaj jaroj okazis grava progreso koncerne la fabrikadon de nafto-industriaj tuboj, kaj kvante, kaj kvalite.

Ties pleja celo estis: pli kontentigi la enlandajn bezonojn pri nafto-industriaj tuboj kaj tiel samtempe malpliigi la importon. Ni faris ankaŭ la unuajn paŝojn por pliampleksigi la gamon de la produktaĵoj, kaj ekigi la eksporton de nafto-industriaj tuboj.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

Ŝtaltubo-produktaĵoj por la naftoindustrio

LA LIBRO DE LA JARO 1983

fariĝis la romano LA BLINDA BIRDO de István Nemere. Kiel konate, tiun titolon por 1982 gajnis LAPPAR, LA ANTIKRISTO de Endre Tóth, tiamaniere la duan fojon verko de hungara esperantista aŭtoro kaj eldonaĵo de Hungara Esperanto-Asocio ricevas tiun honorigan premion.

István Nemere fariĝas lastatempe tute speciala fenomeno sur la kampo de la Esperanta prozo: en liaj verkoj ideale kombiniĝas profundaj etikaj kaj moralaj konsideroj, surpriza temelekto, intereskapta historioteksado kaj vive verva, facila lingvaĵo.

La Redakcio de Hungara Vivo sincere gratulas lin pro la nova sukceso!

István Nemere: La blinda birdo. Originala romano. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1983. ISBN 963 571 104 2. 118 p. 21 cm.
Prezo: 15,- ned.gld.



Naive serena atmosfero

Zora Heide: Etulaj aventuroj. Originalaj noveloj. Eldonis: Författares Bokmaskin, Stockholm, 1983.
ISBN 91 7328 388 6. 21 cm. 103 p.

La unua novelaro de Zora Heide aperis en 1970 sub la titolo „Ni, homoj..." Ĝi elvokis favoran eĥon kaj ĉe la publiko, kaj ĉe la kritiko. La recenzoj vidis la plej grava virto de la verkarto de la aŭtorino la akran observokapablon pri malgrandaj delikataj detaloj de la ĉiutaga vivo, kaj la lertamanan kreon de atmosfero. Tiu ĉi volumo, sekvinta kun iom longa prokrasto la unuan, montras la samajn virtojn en formo pli matura, pli evoluinta.

„Etulaj aventuroj" kondukas la leganton en la mondon de la infanoj, tiuj ĉi puraj, sinceraj, ankoraŭ nemanipulitaj estaĵoj de la mondo. La ok noveloj rakontas infanajn aventurojn, kiuj ne ĉiam estas aventuroj en plenkreskula senco, sed vigle bildigitaj epizodoj el la infana vivo. Zora Heide prezentas la etulajn historiajn unuavice el vidpunkto infana: tiamaniere ŝiaj noveloj estas vere aŭtentika kaj bonkvalita porinfana literaturo, tamen ĉiu historio kaŝas en si ion ankaŭ por plenkreskulaj legantoj. Tiu „io" plej ofte estas veko de nostalgio pri la infanaĝa anima paco, nevundita optimismo, kiuj tiom mankas al la homoj post certa aĝlimo. La plej katena eco de la noveloj estas la naive serena atmosfero, en kiu plezure trempas sin ĉiu, kiu jam trapasis la dudekan jaron.

„Etulaj aventuroj" certe trovos plaĉon ĉe la esperantistaj infanoj, ilin – pro la simpla lingvaĵo – volonte legos ĉiuaĝaj komencantoj, kaj ankaŭ al spertaj legantoj de la Esperanta literaturo ili alportos agrablajn leghorojn.

V. *Benczik*

Fabelo pri la pigra Kukolino

Kiel kovi. Fabelo. Teksto de Lin Songying. Bildoj de Jiang Cheng'an kaj Wu Daisheng. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1983. 17x19 cm, 28 p.
Prezo por Hungario: 30,- forintoj.

Estas konata fakto, ke kukolinoj ne mem kovas siajn ovojn, sed metas ilin en fremdajn nestojn. Pri tio rakontas tiu ĉi fabelo. Printempe la Kukolino vizitas multajn aliajn birdojn, kaj eĉ la Testudinon, por ekscii, kiel ili kovas siajn ovojn? Ŝi ne estas kontenta pri la ricevitaj respondoj: evidentiĝas, ke ĉiuj longe sidas sur la ovoj, kaj varmigas ilin. La Kukolino ne havas emon por tia teda laboro. Eĉ la ekzemplon de la Testudino ŝi ne emas sekvi, kiu kovras siajn ovojn per varma sablo, kaj ĉiutage iras tien por vidi, ĉu la vento ne forblovis la sablon. Fine la Kukolino metas sian ovon en la neston de la Paruino.

La fabelo estas agrabla legaĵo, krome ĝi donas interesajn biologiajn informojn pri la kov-kutimoj de diversaj birdoj. Sed la plej alloga trajto de la libreto estas la ĉiupaĝaj, belaj multkoloraj ilustraĵoj – ĉiu el ili estas vera aparta artverko.

V. *Benczik*

recenzoj * recenzoj

Ne kredu blinde sonĝojn!

Malatentema virino. Bildrakonto. Teksto de Fang Yuan. Bildoj de Zhou Xianche. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1983. 19x21 cm, 24 p.
Prezo por Hungario: 30,- forintoj.

La Malatentema VIrino vivis en la Orienta Vilaĝo. Dum iu nokto ŝi sonĝis tion, ke ŝia patrino grave malsaniĝis. Ŝi vekiĝis el la dormo, kaj en la plena nokto ŝi kaptis sian bebon kaj kuris al la najbara Okcidenta Vilaĝo por viziti sian patrinon. Survoje ŝi falis, kaj hazarde ŝi prenis en la brakojn kukurbon anstataŭ la bebon. Kiam tio klariĝis en la domo de la patrino – kiu estis tute sana –, ŝi rekuris por retrovi sian bebon... sed denove ŝi eraris, ĉar hejme evidentiĝis, ke ŝi kunprenis ne sian bebon, sed la broditan kapkusenon. La bebo trankvile dormis dum ŝia foresto.

La rakonto ne estas aparte sagaca, sed la lingvaĵo estas tre simpla, kaj la belaj koloraj ilustraĵoj faras havinda tiun ĉi libron.

V. *Benczik*

Flama realismo

Eduard Vilde: Laktisto de Mäeküla (romano). Tradukis: Valev Kruusalu, redaktis: Henrik Seppik. Postparolo: Aadu Hint. 256 p. 12,5 x 16,5 cm. Ilustrafoj de Heldur Laretei. Eldonis: Eesti Raamat – Tallinn, 1983.
Prezo por Hungario: 30,- forintoj.

La malgranda popolo de estonoj, laŭdevene kaj -lingve parencoj de la hungaroj, elstare aktivas ankaŭ sur la tereno de Esperanto, ĉefe en la tradukado de majstroverkoj de sia literaturo. Jen, ni ricevis novan libron el Estonio, ĉi-kaze temas pri la Esperanta traduko de la merite disfamiĝinta romano de Vilde: Laktisto de Mäeküla.

La agado okazas fine de la pasinta jarcento. En la fono reliefetas la kapitalismiĝo, sed ĝia krueleco penetras en la sorton de ethomoj, kiuj – sojle de la nova erao – fariĝas viktimoj. Iliaj idealoj devenas el la pasinto, sed la klopodoj realigi ilin, puŝas antaŭen en la futuron, kiu, el la vidpunkto de la senhelpaj homoj, same estas kruela kiel la jam falanta feŭdismo, nur pli rafinitaj fariĝis la metodoj. Ni trovas en la romano purkorajn homojn, kiujn la avido al la pli riĉa vivo ĝis la animfundoj tordas. Tamen kiu(j) kulpas? Kiu(j) estas la veraj krimuloj? La romano estas respondo al tiuj demandoj, kvankam Vilde nek primokas, nek kompatas la rolantojn.

Antaŭ kabanulo Prillup malfermiĝas eblo fariĝi laktisto de la vilaĝo. Sed la prezo estas terure alta. Lia edzino antaŭ nelonge mortis, kaj nun ŝia pli juna fratino edziniĝis al li pro la kompato al la du infanoj. Ŝi estas jam en la komenco preskaŭ memvola viktimo, por ŝi la vojo nur daŭras, kiam ekvidinte ŝin la bienmastro von Kremer komencas marĉandi kun ŝia edzo. Li allogite de la promesitaj materialaj bonaĵoj instigas sian edzinon fariĝi konkubino de von Kremer. Kaj Mari, post longa agitiĝo, fine plejparte pro devkonscio iras en la nobelbienon. Sed la promesita nova vivo alportas nur suferojn kaj tragediojn... La romano per sia ekzisto fariĝis akuzanto. Vilde respondas per sia verko: ĉiu krimulo estas krimo de la socio, kiel tion iam diris Gorkij.

La romano estas atentokapta legaĵo, sperte tradukita. Esperanto havas la eblon prezenti al siaj parolantoj vere mondan literaturon. Nuntempe tre aktualas la konstato de Goethe: la monda literaturo estas la literaturo de la grandaj lingvoj. En Esperanto havas lokon ĉiuj majstroverkoj de ĉiuj popoloj, eĉ tiuj de la malgrandaj nacioj. Bonvenon al la *Laktisto de Mäeküla* en tiu iom-post-iom tamen tutmondiĝanta literaturo!

Imre *Szabó*

recenzoj * recenzoj

Nova fenestro

Moderna Kroatia Prozo. Redaktis: D-ro Ivan Krtaliĉ, tradukis: Roger Imbert. 606 p. 20,5 cm. Tole bindita. Eldonis: Internacia Kultura Servo – Zagreb. ISBN 88 7036 022 9. Prezo por Hungario: 600,- forintoj.



Ŝajnas, ke alvenis nova ondo de antologioj. Tiu renesanco reportas en nova, ampleksigita formo la jam aperintajn antologiojn, sed krome ni povas priatenti ankaŭ novan fenomenon. Montriĝas klopodoj prezenti opajn literaturajn epokojn pli profunde ol ĝis nun iam ajn okazis. Tiu procezo iel memorigas min pri la evoluo de la fenestroj: anstataŭ la iamaj fenestrotruoj aperis pli kaj pli larĝaj fenestroj, el kiuj la pejzaĝo estas plezure ĝuebla.

Jen nova vastega fenestro, tra kiu brilas al ni krutaj montoĉenoj kaj mildaj valoj de la moderna kroata literaturo. La antologio tamen ne prezentas la tutan abundan kroatan literaturon de la jarcentkomenco ĝis niaj tagoj, ĝi entreprenas nur la prozan parton, eĉ el tiu parto nur la novelojn. Tralegante la verkojn de 34 prozistoj de la pasintaj pli ol 80 jaroj, ni spertas, kiel influis la jarcentkomenca vojserĉado ankaŭ la kroatan prozon. Antaŭ niaj okuloj ekfunkcias ĉiuj fortoj strebantaj forviŝi la limojn inter la opaj ĝenroj, klopodantaj „literaturigi" la opajn dialektojn de la kroata lingvo. Tamen en ĉiuj stiloj kaj reformemoj ni povas sperti econ tiom karakterizan por la Mez-Eŭropaj literaturoj: la literaturo estas armilo kaj kuracilo, la verkistoj plej plene partoprenas la historian procezon, ne nur pasie, sed pasie aktivante ĉiutempe. Ili volis kaj ankaŭ nuntempe volas utili, konscie lukti por la bono de la propra popolo kaj pere de tio por tiu de la tuta mondo. Do, estas inde, ke en la monda literaturo ankaŭ la kroataj verkistoj havu sian lokon. La ĵus diritaj laŭdas la laboron de la redaktoro, li sukcesis prezenti al ni ĉion, kiel vera mastro prezentas sian bienon.

Por ni, hungaroj la kolektaĵo estas aparte interesa, ja la pasinto de la kroata kaj hungara popoloj estis iutempe komuna. La verkistoj de niaj popoloj prezentis la saman realon, do ne estas surprize, se ni trovas okulfrapan parencecon. La vidpunktoj, nature, ne estas la samaj, sed nepre tre proksimaj ne nur laŭ la politikeco ĝenerale, sed ankaŭ metode. Kaj tiu parenceco daŭras ankaŭ post la militoj, ja niaj literaturoj ne nur geografie estas proksimaj, sed mil kaj mil ligiloj ekzistas inter ili, per mil kaj mil harfajnaj – kaj ne nur hajfajnaj – tubetoj ili nutras unu la alian.

Recenzo ne taŭgas detale analizi la laboron de tradukinto, kaj ĉefe ne kaze de tia ampleksega verko, kia estas la *Moderna Kroatia Prozo.* Lia intenco prezenti la opajn dialektojn estas tre nobla. Sed la rezulto estas jam sufiĉe duba. La kroata havas dialektojn, Esperanto ne, la kroata havas arkaikajn formojn, Esperanto malpli. Kion fari? Ĉu tordi la vortojn, kiel tion faris Imbert? Li uzas formojn ekz.: ku, ko, ka, kam, kom, kal, kes (anstataŭ kiu, kio, kia, kiam, kiom, kial, kies) kaj 'kaŭ, doŭ, m' (ankaŭ, do, mi), aŭ i, ki, ti, ĉi, pito, miam kapom (ie, kie, tie, ĉie, peto, mian kapon). Kion diri? Estu mi eĉ damnita hundido, sed kara sinjoro, tion mi ne komprenas, tio havas nenion komunan kun Esperanto. Originala verkisto eble havas la rajton eksperimenti kaj CERbumy pri tiaĵo, sed tradukisto ne rajtas esti pli avangarda ol la verkistoj, li rajtas uzi nur tiujn rimedojn, kiujn certigas la lingvo. Krome ĉi tie temas pri tutaj verkoj skribitaj en la opaj dialektoj. Ili estas identaj kun la uzata lingvo sur la koncerna teritorio, do la tradukoj devas esti identaj kun Esperanto. Aŭ ni prefere klopodu sentigi la originalan staton ankaŭ kaze de la opaj lingvoj, ni inventu apartan Esperanton por la germana, por la rusa, por la hungara ktp? Mi krias: eee, imdulgu miam povram kapom!

Spite al la ĵus diritaj mi proponas tamen al ĉiuj esperantistoj konatiĝi kun la kroata literaturo, ja ĝi meritas tion.

Imre *Szabó*

Lorjak: Eŭlalia. (Originala romano kies temo estas ridige amuza krimhistorio.) Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1984. 192 p. 21 cm. ISBN 963 571 126 3.
Prezo: 21,- ned. gld.
Aperos en junio de 1984.

GAJA PAĜO

Sentema homo

– Hieraŭ mi restis sen vespermanĝo!

– Ĉu via edzino ne zorgas pri vi?

– Eĉ, ŝi afable aĉetis por mi sardinio-skatolon, ĉar ŝi forvojaĝis al ŝia panjo. Sed kiam mi malfermis la skatolon, mi tiel ekkompatis la fiŝetojn, ke mi ne povis eĉ tuŝi ilin...

Ankaŭ sente-mulo

– Sed vi estas ja tute sana! Kial vi venis al mi? – miris la kuracisto.

– Estas tiom da malsanuloj ĉirkaŭ mi, kara doktoro, kaj hejme, kaj kie mi laboras! Finfine mi jam hontis, ke mi ŝajnas sana...

Ĉu sente-mulino?

– Kio okazis? Kial estas via kapo bandaĝita?

– Okazis aŭto-akcidento... Ĉar mia edzineto estas nuntempe ege sentema.

– Do ŝi kondukis okaze de la akcidento, ĉu ne?

– Parte: al la ambulanco. Sed antaŭe ŝi trovis fremdan lipruĝon sur la aŭtoseĝo.

Kaj se oni estas malsentema

La arbaristo haltigas maljunulinon, kiu portas korbon kun fungoj:

– Ĉu vi ne timas, onjo, ke venenaj fungoj miksiĝis al la aliaj?

– Kial mi timus? Morgaŭ ĉiujn mi vendos en la foiro...

Kaj se oni estas pesimisto

– Ĉu vi ne sciis? Neeble! Antaŭ sep jaroj mi informis vin per letero pri mia edziĝo!

– Nu, mi ekmemoras! Mi ricevis, sed ankoraŭ ne malfermis ĝin pro timo, ke ĝi enhavas malbonan novaĵon.

Ho, kelnero!

– Rekomendu al mi ian malpezan manĝaĵon!

– Volonte: mi proponas al la kara gasto la 150-graman bisftekon. Ĝi pezas nur 70 gramojn.

Amromano...

– Mia edzo estas verkisto! – fieras la nova najbarino. – Ĉiujare oni publikigas novan amromanon de li.

– Ne granda afero! Mia edzo eĉ ĉiumonate prisilentas sian novan amromanon.

... Kaj la heroino

– Jolanda! Ĉiutage vi malfrue venas en la oficejon? Ĉu vi klarigos tion?

– E, ej, kara ĉefo! Vi ankaŭ estis juna!

– Jes, mi estis – sed ne ĉiunokte!

Plendo

– Nenio fareblas, panjo! Mia edzo ne volas eksedziĝi. Laŭ li, antaŭ tio ni devas pli bone ekkoni unu la alian.

Kaj malplendo

– Nu, fine mi vivos en pli bela ĉirkaŭaĵo, kara najbarino – asertas sinjorino dum ega pakado.

– Kaj ankaŭ ni en pli trankvila ĉirkaŭaĵo!

– Do ankaŭ vi translogiĝos?

– Ne. Nur vi.

Mebloportistoj

– Aŭskultu, amiĉjo! Porti tiujn modernajn meblojn mi ja kapablas sursultre, sed rigardi ilin, neniel!

Novan someran robon...

mi bezonas – venas la deklaro desur la edzinaj lipoj. – En miaj malnovaj ĉifonoj oni rigardas min kuiristino.

– Invitu ilin tagmanĝi – tiel la edzo –, kaj ili tuj rekonos la eraron.

La lernejan atestilon...

de la fileto la familio scivoleme atendas.

– Montru ĝin urĝe al mi – alparolas la patro. – Mi volas jam koni, kian klasifikon mi ricevis pri matematiko.

Tento aĵ malkontento

– Vi devas esti kontenta pri la nova sekretariino! Eĉ viajn dezirojn ŝi eltrovas.

– Sed ne plenumas...

Sonĝe sub...

– Bonan nokton, karulino! Mi ekiras al la kelo.

– Ĉu nun? Noktomeze? Sed kial?

– Ĉar mi volas profunde dormi.

Ankaŭ frenezaĵo

En la teatrejo sinjorino flustras al sia edzo:

– Nun venos la granda monologo!

– Espereble – reagas la edzo – li ne sidiĝos antaŭ ni!

E.F.

Paĝo de komencantoj

El «Amuza Legolibro en Esperanto» de Albert Lienhardt

22. Evald volus havi trumpeton

Evald estas *muzikema* knabo. Ĉar, baldaŭ, revenos la dato de lia *naskiĝo,* lia patrino demandis lin: «Diru al mi, Evald, *kian* donacon vi volus *ricevi,* okaze de via *naskiĝa* festo? »

«Mi volus *trumpeton*», respondis la knabo.

«Ne, ne!», protestis lia patro, kiu aŭdis la respondon, «ĉu eble mi aŭdu *trumpetan* bruadon dum la *tuta* tago? »

«*Ne* timu, patro!», provis Evald kvietigi sian patron, «mi *promesas* al vi, ke mi trumpetos nur *tiam,* kiam vi *dormos.* »

32. Franciska estas tre sci-vola

En la *sesa* lerneja *klaso,* oni scias, ke *Franciska* estas *tre* sci-vola *knabino.* Ŝi volas scii *ĉiujn* sekretojn, eĉ la *plej* sekretajn, pri siaj kamaradinoj.

Hieraŭ matene, ŝia *klaso*-najbarino Renata ricevis *leteron.* Kiam Franciska ek-vidis la leteron, ŝi *tuj* provis ek-scii *detalojn* pri la *en-havo* kaj la *sendinto* de la mistera poŝtaĵo.

«Mi aŭdis, ke la *leter*-portisto alportis *leteron* por vi», ŝi diras al Renata.

«Jes», respondas Renata lakone.

«Ĉu ĝi estas *interesa*? », demandas Franciska.

«Jes», respondas Renata *same* lakone.

«Mi ne estas sci-vola», daŭrigas Franciska, «sed... de *kiu* ĝi estas? »

Renata demandas al Franciska, kun *grava* mieno: «Ĉu vi povas *silenti*? »

Franciska vigle respondas: «Jes, jes! Kompreneble!»

Renata *pli* insiste demandas: «Ĉu, *vere,* vi povas gardi *sekreton*? »

«*Absolute* certe», rapide respondas Franciska.

«Nu», replikas Renata seke, «ankaŭ *mi!* »

42. Aero estas necesa

En la lernejo, la instruisto faris lecionon pri la aero. Li eksplikis: *kio* estas aero, el *kio* ĝi konsistas, kaj por *kio* ĝi estas necesa en la naturo.

Subite, li vidis, ke *unu* el la lernantoj *tute* ne estas atenta pri liaj paroloj.

«Hans!», li vokis severe, «ĉu vi *ne* atentis pri tio, kion mi ĵus eksplikis? »

«Tamen, jes, sinjor' instruisto», respondis Hans, surprizita.

«Nu, tiam *diru* al mi», daŭrigis la instruisto, «*kial* la aero estas *tiel* grava por la *homo*? »

«Ĉar», balbutis Hans, «ĉar sen *aero,* oni *ne* povus *plenblovi* la *aero*-tubojn de la bicikloj kaj de la aŭtomobiloj.»

52. Buŝumo por hundo

Sinjorino Miller posedas *grandan* hundon, el la *fama* raso «germana ŝafisto-hundo». Ĝi estas *bela* besto; sed, ĉar ĝi estas *mordema,* sinjorino Miller decidis aĉeti *buŝumon,* kiu malhelpos la hundon mordi pasantojn.

Tial, ŝi iris en specialan *butikon* por *besto*-artikloj.

«Jen, sinjorino», diris la juna butikisto, «jen vi povas *elekti* inter *pluraj* specoj de buŝumoj».

«Mi prenos ĉi *tiun*», diris la klientino kaj *tuj* pagis la artiklon.

«Ĉu mi *sendu* la buŝumon al via *adreso*? », demandis la afabla vendisto, «aŭ ĉu vi preferas *mem* porti ĝin? »

56. Ĉar lia fratino estas malsana

Aldo estas juna *lernejano,* kiu loĝas en la itala urbo *Firenze.* En iu mateno, li *re*-venis *hejmen* el la lernejo, jam je la *naŭa* horo.

Tio iom *maltrankviligis* lian patrinon; tial, ŝi *tuj* telefonis al la instruisto.

«Bon-volu *klarigi* al mi», ŝi diris, «*kial* vi *re*-sendis mian filon *hejmen,* hodiaŭ matene? »

«Nu», respondis la instruisto, «Aldo *demandis* al mi, ĉu li devas *re*-iri *hejmen,* ĉar lia fratino estas *malsana* pro *difterio... Ĉu,* eble, li *ne* diris la *veron*? »

«Tamen, jes», eksplikis la patrino, «la *veron* li diris; sed lia fratino ja loĝas en *Usono,* en *Ameriko!* »



El la poezio de E. Miĥalski

Ni citas strofon de lia poemo: „Mi stelojn jungos..." „Mi estas forto kaj giganto / Kaj regontul' de l' universo / La morto? Ho, ĝi plu ne tedos..." – La daŭrigon vidu en linioj H.1., V.38. kaj V.26. (ensendendaj linioj). Inter la solvantoj ni lotumos premiojn.
Limdato: unu monato post la alveno de la revuo.

Horizontale: 13. Epopeo de Homero, parte esperantigita de A. Kofman **14.** Refleksivan pronomon **15.** Elemento de poeziaĵo (R) **16.** Glasoj sonas tiel interfrapite **17.** Multe diskutata finaĵo **18.** Formi ideojn en la menso **19.** Subtera vojgalerio **21.** Nenia kvanto **22.** Produktaĵ' de birdoj **24.** Kemia element' (Y) **25.** Mezurunuo de elektra tensio **26.** Poseda pronomo **28.** Konata inform-agentejo **29.** Profesio **30.** Reen: numeralo **31.** Provizas per bataliloj **33.** Konvenan, konforman, taŭgan **34.** Prefikso por kontraŭa ideo **35.** Ne vian **36.** ...-eco: varma kordelikateco **37.** Direbla pri prahistoria tempo **38.** Franca Johano **39.** ..., sed alio (du vortoj) **40.** Emblemo de ludkartoj **41.** Gento (R) **42.** Unu el la gepatroj **43.** Kalka mara estaĵo (R) **44.** Reen: H.51. **45.** Kategorio de literaturaj verkoj **46.** Artikolo **47.** Posteulo **48.** Senso alie **49.** Ilo por manĝi (R) **51.** Prepozicio por komparativo **53.** Interjekcio **55.** Memo **56.** Muka elfluo pro inflamo **58.** Ĵeti globon lude **60.** Frukto (R) **61.** Kaŭzos suferon al iu pro ties kulpo **63.** Kovras virinan vizaĝon **64.** Sciigi perbuŝe (R) **65.** Preĝeja bildo de Maria.

Vertikale: 1. Perioda ŝanĝo en muziko kaj poemo **2.** Ne tute eligi! **3.** ...-akso: parto de gramatiko, okupiĝanta pri frazkonstruo **4.** Dekori haŭton per inko **5.** Samas **6.** Ne – angle **7.** Ekzisto **8.** Apartenanta al si **9.** Frakcio (R) **10.** Grava okazaĵo **11.** Absoluta manko de io **12.** Mamulo **17.** Araba virnomo **18.** Klasika bulgara beletristo (Elin) **20.** Disrompi terbulojn (R) **21.** Oficisto, rajtigita doni dokumentojn **23.** Eta ino **25.** Fama italia urbo **27.** Abundan, multan **29.** Estaĵo kun nenormala formo **30.** Samideano, kunbatalanto **32.** Membron **33.** Parto de la literaturo **34.** Lasi viandon en acida likvaĵo **36.** Kiu tenas **37.** Fluidaĵo por skribi **42.** Ilo de pentristo (R) **43.** Osteca, kirasa ŝelo de animaloj **45.** Unu el la samtempe naskitaj idoj **46.** Konsulti la sorton (R) **49.** Nepreciza sciigo (R) **50.** Sovaĝe, maldelikate **52.** Restigos por si **54.** Reen: turnu surtere, ekz. cilindron **56.** Organaro de bestoj (R) **57.** Reen: ago de ofero **59.** Aersimila fluidaĵ' **60.** Frukto (R) **62.** Frakcio **64.** Numeralo **65.** Molibdeno

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

La fermita urbo
de István Nemere

La esperantistaj legantoj jam bone konas la nomon de István Nemere. Lia sciencfikcia romano „La fermita urbo" vekas atenton per alloga temo, kiu tute kurioze disvolviĝas en la 15a kaj 26a jarcentoj paralele.

1. Kiam naskiĝis Mark Bellor?
2. Kiel nomiĝas la direktoro de la Instituto en Thorlund?
3. Kian rangon havas Mihajlov?

Limdato por respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1983/6:

1. Gavrilo Gavriloviĉ R. vivis en Nenarodovo.
2. Pentuer estis la skribisto en „La Faraono".
3. „La Infana Raso" de William Auld komenciĝas tiel: „Saluton, masonisto, mia prapatro Ruben."

Libropremion gajnis: *Takács* István, Marcali, H: *Yamaguti* Mitio, Suwa-si, J. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

*

Solvo de la krucenigmo en n-ro 1983/6:

Ho, lingvon komunan donu homa menso,
Kiu pri la kunaj cel', ideo, penso,
Decidos por ni per alia gramatiko! (G. Hegedus)

Premion gajnis per lotumado: Eva *Benická,* Košice, CS; Klaus-Dieters *Dungert,* Magdeburg, GDR; Jelena *Kolotovĉenko,* Ĉelabinsk, SU.

LETERKESTO

Korespondi deziras

Redaktorõj de gazeto „Neiwai Untan", Ĉinio: Dum akcelo de via landa progreso tutcerte ankaŭ la modernigo de la antikva-tradicia ĉina skribsistemo estas gravega; tiun vian opinion ni povas nur modeste konsenti. Tiurilate estas interesaj ankaŭ la klopodoj por adapti latinan alfabeton al la Han-lingvo. Kiam vi utiligas Esperanton por disvastigi la reforman skribsistemon de la ideogramoj, la cetere ĝusta reformemo – laŭ nia opinio – tamen ne devas etendiĝi al la E-a ortografio... Ni forte dubas, ĉu la artefaritan problemon pri la ĉapelhavaj E-literoj „celtrafe" solvos CH, SH, kiel duobligitaj literoj: Inter aliaj ege malkonvenos ekzemple la oftega matematikaĵo X/Y, se oni devus ĝin *prononci* (laŭ via propono): „ĥo-per-ĵo", anstataŭ la bone distingebla „iks-per-ipsilono" ktp. Oni ja devas koncerne la ortografion atenti ankaŭ tiujn flankojn de la vivo (aŭ parolo)! Multajn salutojn!

C.P. Westerveld, Purmerend, NL: Estis lerta eltrovemo viaflanke, *utiligi* la ne-finitajn novelojn de *Sz. Bálint* dum kurso de progresantoj, respektive kiel „hejmtaskon" de klubanoj. La iel faritaj „daŭrigoj" klare montras la vekitan intereson kaj la ekmovitan fantazion, ankaŭ la bravan emon esprimi pensojn en nia lingvo. En tiu ĉi numero de HV jam legeblas la novelo-fino fare de la (laŭ ni) venkinta klubanino. Via iniciato meritas rekomendon al multaj klubgvidantoj tra la mondo, kaj favore al la klubprogramo, kaj helpe al la lingva progresigo.

Molnár László, Szolnok, H: La tradukprovon de la „Gajaj kunuloj", novelo de la grandtalenta verkisto Endre Fejes, ni legis kun certa atendemo: ĉu eblas redoni en Eo la specife hungarajn, eĉ vulgarajn eldirojn? Tiaspecaj malfacilaĵoj ekzistas inter ĉiuj ajn lingvoj, kaj prezentas *realan maleblon* al konforma tradukado. Tiajn nevenkeblajn faktojn – eventuale post iom da eksperimentado – oni devas rekoni, kaj – eviti (aŭ kontentiĝi je malbona traduko). Troveblas abunde tradukindaĵoj inter la literaturaj perloj, ili havigos al viaj kapabloj pli bonvenan sukceson.

Julia Martinoviĉ, Lvov, SU: Malgraŭ via dankinda konfido pri nia kritikado, bv. kompreni: prijuĝi tradukon estas tre malfacile sen la originalo. Vi uzas korekte E-on: sed kiel ni povus rimarki la eventuale transsaltitajn malfacilaĵojn de la originalo, por mencii nur unu problemeton. Do tiucele oni prefere fidu enlandan spertulon. Laŭteme la prozaĵoj, kiujn ni legis kun plaĉo, ne ŝajnas sufiĉe interesaj por nia revuo.

Sune W. Ahlm, Vänersborg, Svedio: La ideon de *Géza Hegedüs* (Diskuto kun Babelo) certe vi jam bone komprenas: lian esperon pri la tutmondaj plenumoj de Eo. Cetere „novaj vortoj" tie ne troveblas. Aliflanke vi tute pravas, ke fojfoje oni devas serĉi en E-vortaroj nekonatajn vortojn de artikoloj kaj verkoj. Tiel okazas ĉe ĉiuj lingvoj! Anglo aŭ franco, svedo aŭ ruso, se post jardekojn longa dormo denove legus gazeton de sia lingvo, nepre devus serĉadi kaj informon peti pri multaj vortoj kaj sencoj! Tiel estas – sed multe malpli! – se ni legas en la „fremdlingvo" Eo; post iom da tempo ni renkontas nekonatajn vortojn. Certe, la verkantoj devas enkonduki ilin nur modeste. Tamen, certagrade tio ne estas evitebla, ĉar la mondo progresas kaj en ĝi ankaŭ ni. – Via vojaĝo estos tutcerte agrabla. Bondezirojn!

Cinaj medicinistoj korespondus kun kolegoj en tm. Bv. mencii ankaŭ vian fakon kaj specialajn interesojn al la landa delegito s-ro *Peng* Jianjun, Chezhan Xincun 350-1, *Xujiapeng,* Wuchang/Wuhan, Ĉinio. – Violeta D. *Dobreva* (24) ĵurnalistino kun fakuloj kaj aliuloj, str. N. Laskov 2, *Boljarovo,* BG-8720. – Kalina A. *Borisova* (28) instruistino ktm, *Jambol,* VII Petiletka Bl.61/A,ap.4, BG-8600. – Igor *Plotnikov* (30) biologo, ktm, pĉt, kol. pm. *Leningrad,* av. Svetlanovskij 5-15, SU-194.223. – S-ino Tanja *Georgieva* (27) ktm, *Jambol,* str. Radi Kolesov 11, BG-8600. – F-ino Elena *Stojanova* (19) kun gejunuloj pĉt. *Jambol,* str. V. Kongres Bl.2/2, ap.10. BG-8600. – F-ino *Magyar* Tünde (18) kun gejunuloj el tm, pĉt, *Dombovár,* Táncsics M.u. 31. H-7200. – S-ro Hilmat Ilton *Santana Ferreira* pĉt. ktm, *Itabuna-Bahia,* Rua A. Fleming 210, Goes Calmon, BR-45600, Brazilo. – Vilmárs *Zakis* (20) fraŭlo, aŭtoseruristo, ktm. pĉt, ankaŭ kiel radiosportisto. *Ape* Padomju 20, Latvio SU-228.737. – Marina E. *Najdenova* (24) instruistino, str. Stara planina 12/2, ap.31. *Jambol* BG-8600. – Radost A. *Hristova* (23) instruistino, *Zimnica,* BG-8610.

Klubo „Esperanto" en la 2500-jara antikva urbo atendas korespondamikojn el tm: *Samarkand,* Glavpoĉtamt ab.j.76, Uzbekistano, SU-703000. – Martti *Suurorg* (16) kun gejunuloj pdt. *Tallinn* poste-restante, Estonio, SU-200.021. – Irana junulo, Rahim *Davari* pri psikologio, studado, junularaj aferoj. *Bonab* Ketab Ferusiye, Mirzakhani, Irano 5631. – Sud-Koreaj junuloj korespondus kun ges-anoj: skribu kun viaj personaj indikoj al Koresponda Servo de KEA, *Seulo,* CPO Kesto 4258, Korea Resp. – Peter *Arndt* (28) maŝinfabrika laboristo, pri muziko, literaturo, teatro, ktm. *Güstrow,* W. Pieck Str. 81. DDR-2600.

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO + Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** + Arta redaktoro: **Eszter Kiss.** + Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** + Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfons Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** + Budapest, pk. 193. H-1368. Telefono: 141-078, 334-194. + Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. + Respondeca eldonisto: **Tibor Vaskó.** + Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. + Abonprezo por jaro (ses numeroj) 78,- Ft, al eksterlando por unu jaro 96,- forintoj. + Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest, P.O.B. 149, H-1389). Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. + Presejo de Hungara Esperanto-Asocio, Budapest. Respondeca gvidanto: **Tibor Vaskó.** + **Indexszám: 25 377 ISSN 0018–7704**

hearota

Diderot: *"Ne ekzistas beleco sen unueco..."*
Ni kreu ĝin kune.

Ŝlosilo por ĝi estas la skalo de produktoj,
la var-sortimento de **BUBIV**

Markovendejoj: BUDAPEST III. Ezüsthegyi út 2.
VII. Rózsa út 4-6.
VIII. Baross út 75.
EGER Dobó tér 8.
GYULA Felszabadítók útja 79.
JÁSZBERÉNY Lazovi út 2.

bubiv

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

BÁV

BÁV

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
V. Duna Intercontinentál

1984 JUL 18